

# juna amiko

septembro 2016 • n-ro 3/2016 (148) ←



INTERNACIA  
ESPERANTO-REVUO  
DE ILEI  
POR LERNANTOJ  
KAJ KOMENCANTOJ

Konversaciaj temoj: Nova lernejo  
Sukero: ĉu amiko aŭ malamiko?  
Per pentroarto al Esperanto  
Interkultura Mondo:  
Konferenco de ILEI



Rigardu, la ĝemeloj ĉiam kun libroj.

Hm! Ili volas nur ŝajnigi esti scivolemaj.

Iliaj gepatroj donacas multajn librojn al ili, ŝajnas ke ili ŝatas legi.

Bone, ĝis morgaŭ, Klaŭdia

Ĝis morgaŭ, Arielo.

Iom poste

Paĉjo, helpu min.

Ĉu vi jam komprenis? Jes

Diru al via instruistino, ke ŝi klarigu pli bone.

Kiam mi estos pli aĝa, mi volos scii tiom, kiom vi. Kion mi devas fari?

Legi.

# Enhavo

**Bildstrio Klaŭdia** (Sonmy Álvarez, CU) ..... 2

**Enkonduke:** Karaj amikoj! (Stano Marček, SK); Renkontiĝoj (Mireille Grosjean, CH) ..... 04

**Konversaciaj temoj:** Nova lernejo (Judith Felszeghy, HU) ..... 05



**LUME:** El mia kolora vivo: (Pavel Rak, CZ) ..... 09

**Nia sano:** Sukero: ĉu amiko aŭ malamiko? (Renée Triolle, FR) ..... 10

**Pentroarto:** Per pentroarto al Esperanto (Aranka Laszlo, HU) ..... 11

**LUDE,** la unika dua etaĝo: Amiko fidela estas trezoro plej bela (Mónika Molnár, CH) ..... 13

**Matenadaran:** La plej granda kaj la plej malgranda libro (Lida Elbakyan, AR) ..... 16

**EKSTERE:** Flegejo por sovaĝaj bestoj (Raita Pyhälä, FR) ..... 17

**Legu kaj ĝuu** (Małgosia Komarnicka, PL) ..... 18

**Ekkonu mian landon pere de ĝiaj legendoj:** Brazilo (Małgosia Komarnicka, PL) ..... 22

**Kantu kun Juna Amiko:** La sorĉa kanto-mondo (Małgosia Komarnicka, PL) ..... 25

**Interkultura Mondo:** Konferenco de ILEI (Elena Nadikova, RU) ..... 26

**Afriko:** En la norda parto de Benino (Eteka Kami Laifo)



Innocent, BJ) ..... 29

**Fabelo:** Sorina el nuboj (Luiza Carol, IL) ..... 30

**Recenzo:** La knabino el la montaro: montaro ("La migro- kaj lernejoj de Heidi" kaj "Heidi povas apliki, kion ŝi lernis"; Luiza Carol, IL) ... 33

**Enigma pri Japanio** (Hori Yasuo, JP); Solvo de la krucenigmo; kaj alumenigmo ..... 35

**LASTE:** Lernanto - en la centro de la atento; krucenigmo (Stefan MacGill, HU/NZ) 37

**Landaj Perantoj de Juna Amiko** ..... 38

**Frontpaĝe:** Fine de aŭgusto Emese kun du amikinoj okazigis ekspozicion de pentraĵoj (legu sur la p. 11)

**Dorspaĝe:** Bildstrioj Kukuo la feo (Á. Velasco, CU)

**Eldonanto de Juna amiko:** Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Jura sidejo: Centra Oficejo de UEA, Roterdamo, Nederlando. **Retejo:** sub rekonstruo ĉe [ilei.mondo.info](http://ilei.mondo.info). Ĉefaj informoj pri Juna Amiko: <http://ilei.info/revuoj/?lingvo=eo>. Historio de la revuo: [http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna\\_Amiko](http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna_Amiko). La numeroj de 0 ĝis 138 (1972 ĝis 2014) estas publike legeblaj ĉe: <http://www.eventoj.hu/juna-amiko/>. Vidu ankaŭ lernu. net kaj edukado.net. **Redaktoro:** Stano Marček (Zvolenská 15/21, SK 036 01 Martin, Slovakio), [stano.marcek@gmail.com](mailto:stano.marcek@gmail.com) aŭ [redakcio@gmail.com](mailto:redakcio@gmail.com). **Lingvaj reviziantoj:** Karine Arakeljan (Armenio), Trezoro Huang Yinbao (Ĉinio), Doi Ĉieko (Japanio). **Rubrikestroj:** Judith Felszeghy, Stefan MacGill (ĉiuj el Hungario), Małgosia Komarnicka (Pollando), Mónika Molnár (Svislando), Elena Nadikova (Rusio), Luiza Carol (Israelo). **Kunlaboranto:** Raita Pyhälä (FI). Presita en Slovakio. **Administranto:** Sebastian Cyprich, [ILEI.Oficejo@gmail.com](mailto:ILEI.Oficejo@gmail.com). **Landaj Perantoj** sur la p. 38. La sekva numero aperos en novembro. **Limdatoj por sendi kontribuojn:** ĝis la fino de januaro, aprilo, aŭgusto kaj oktobro. **Jarabono** €18 en tiel nomataj A-landoj kaj €13 en B-landoj, laŭ la kategorioj de UEA (€15 kaj €12 por mendo de 3 aŭ pli da ekzempleroj al la sama adreso).

ISSN 0230 1318



## Karaj amikoj!

**F**iniĝis la ĉi-jaraj ferioj aŭ libertempoj, kaj antaŭ ni estas la nova lernojaro aŭ daŭrigo de la interrompita laboro.

Tiu ĉi numero plurloke pri-traktas lernejojn, lernantojn, instruadon kaj librojn. La rubriko Konversaciaj Temoj temas pri la nova lernejo kaj la studenta vivo, la artikolo pri la pentroarto prezentas eminentan studentinon el Serbio. Vi legos pri la plej granda kaj la plej malgranda libroj en Armenio, la rubriko Legu kaj Ĝuu tuŝos la traduk-arton kaj du novajn librojn en



Esperanto, pri kiuj sekve aperas ankaŭ recenzo. La rubriko Interkultura Mondo raportas pri la konferenco de niaj instruistoj en Hungario. En la rubriko "LASTE" vi ekscios, ke la lernanto estas en la centro de la atento en la Jaro de la Lernanto, proklamita de UEA kaj ILEI. Sed en la numero ne mankas kaj distros vin ankaŭ aliaj temoj: la tradiciaj bildstrioj, kolorigendaj bildoj

de la rubriko "LUME", artikoloj pri nia sano kaj la sukero, pri flegejoj de bestoj, pri la tre interesaj landoj Brazilo kaj Benino... – Intervjuoj, spacveturado, fabeloj, enigmoj, krucenigmo kaj iliaj solvoj, kanto... – Agrablan legadon, karaj amikoj! Via redaktoro **Stano Marček**

## Ni ĉiuj estas LERNANTOJ

**K**iu povas aserti: "Mi scias ĉion!", "Mi ne plu devas ion lerni".

–Neniu! Ni ĉiuj estas survoje al akiro de novaj pliaj scioj. Sendepende de nia aĝo. Lernado okazas tra la tuta vivo.



Kiel la lernado okazas, kio okazas en la cerbo, kial infanoj lernas pli rapide ol plenkreskuloj, jen demandoj tiklaj. La lernado fakte estas kvazaŭ miraklo. Neklarigebla fenomeno.

UEA kaj ILEI lanĉis la Jaron de la Lernanto (julio 2016 – julio 2017) kaj provos esplori tiun fenomenon, efike helpi al Esperanto-lernantoj, lertigi geinstruistojn al trafa agado en kontakto kun lernantoj. Pro tio ILEI kaj la redaktoro de via revuo *Juna Amiko* ankoraŭ pli atentis pri la enhavo de la

revuo, ĉar ĝia celo estas ebligi al vi agrablan lernadon de nia lingvo kaj de multaj aliaj aferoj. Ofte oni lernas el libroj. Legante la rakonton pri la vivo de Heidi vi malkovros kuraĝan knabinon.

Kami Laifo, kiu rakontas pri la nordo de Benino, kie li instruas Esperanton, lernas en grandega sudbenina urbo informatikon, do li ĉefe lernas per komputilo. Sed oni lernas ĉie kaj ĉiam, lernado povas okazi surstrate aŭ en arbaro, observante plantojn. Ni havu niajn okulojn kaj niajn orelojn malfermitaj!! Ni nutru nian cerbon!! Ni digestu niajn novajn sciojn per nia inteligenteco kaj saĝeco!!

**Mireille Grosjean**  
Prezidanto de ILEI

## Nova lernejo

Help-materialo por ekzamenotoj. Rubrikestro: Judit Felszeghy.

### I. Malfacilaĵoj ĉirkaŭ la ŝanĝo de la lernejo

**Panjo (P)** kaj ŝia 15-jara filino **Karina (K)** babilas en sia hejmo.

K – Hm... En kia distanco ĝi troviĝas de nia nova loĝejo?

P – Karina, ni ekloĝos province... Tamen, tiu ĉi bela gimnazio troviĝas en la urbo... ĉiutaga 60-kilometra veturado estos laciga por vi! Rigardu, jen oni proponas loĝadon en studenthejmo...

K – Ne! Ne, ne! Mi ne volas loĝi en studenthejmo! Tiel mi ne volas frekventi la novan lernejon!

P – Ĉiuvendrede ni veturos al la urbo por preni vin el la studenthejmo kaj veturigi vin hejmen! Vi ankoraŭ eĉ ne rigardis la studenthejmon! Tute moderna konstruaĵo, bele ekipitaj

ĉambroj, ne pensu pri tiaj, kiaj estis antaŭ dudek jaroj!

K – Ne, Panjo, mi ne volas!

P – Filineto mia, nun mi devas aranĝi ĉion rilate la aliĝon: jam dum la somero oni ne povos akcepti novajn gelernantojn en tia renoma gimnazio; estas tro multaj kandidatoj!

K – Terure! Ĉu mi eble devos fari eĉ akceptan ekzamenon?

P – Certe ne, mi jam interesiĝis pri ĉio rekte ĉe la direktoro! Vi simple daŭrigos viajn studojn en la nova klaso.

K – Sed mi tute ne volas loĝi en studenthejmo!

P – Karina, vi ankoraŭ eĉ ne vidis la faldfolion pri ĝi! Rigardu, kiel komforta ĝi estas! Dulitaj, bone meblitaj ĉambroj, kun antaŭĉambro, vasta duŝejo apude, manĝejo... Rigardu almenaŭ la bildojn, kara!



## II. Studenta vivo

**Karina (K), Davido (D), Elinjo (E), Francisko (F), Ivano (I), Jozefo (J), gestudentoj de la sama klaso, babilas post la lecionoj en parko, proksime al la gimnazio.**

D – Ĉu iu venos al la studenta klubo por la posttagmeza programo?

E – Pri kio ĝi temos?

D – Tie disvolviĝos interesa prelego kun projekciado pri gotika arkitekturo.

F – Mi eble saltos tien, lerninte la novajn vortojn en Esperanto, kaj solvinte la matematikajn taskojn.

K – Ĉi-foje ili estas nekutime malfacilaj; mi timas, ke mi eĉ unu ne povos bone solvi!

D – Vespere, se por vi tio konvenas, mi povos helpi vin.

K – Dankon, bonege! Ĝis tiam mi trarigardos la geografion kaj literaturon; morgaŭ ni skribos kontrollaboraĵojn; mi ne volas malsukcesi!

F – Miaj kontrollaboraĵoj estas kutime plenaj de eraroj, se mi ne povas uzi kaŝhelpilon! Krome ankaŭ mia ortografio estas terura.

E – Sed mi ofte sufloras al vi, Francisko!

G – Mi estas tamen pli zorgema pri la morgaŭa praktikado pri kemio. Mi ne kapablas parkerigi la kemiajn nomojn de la materialoj, kaj la instruistino daŭre demandadas pri tiuj.

D – Ne estas malfacile ellerni ilin, se vi konas ilian Esperantan nomon.

I – Ankaŭ mi konfuziĝas pri la kemiaj kaj

fizikaj simboloj, kiam la instruisto pridemandas min. Bonŝance nek kemio nek fiziko estas ekzamena studobjekto en la abiturientigo!

D – Mi tamen devos plenumi la akceptan ekzamenon, kaj pri fiziko kaj pri matematiko, por aliĝi al la arkitektura fako de la teknika universitato.

E – Mi ankoraŭ ne decidis pri la estontaj studoj; sufiĉas prepari min por la abiturienta ekzameno. Lastjare la ekzamenantoj estis altrangaj universitataj profesoroj, ili taksis la ekzamenitojn tro rigore, kaj do multaj malsukcesis!

K – Trankviliĝu, Elinjo, ĝis tiam ni havas ankoraŭ du jarojn!

F – Se ni ne ripetos la klason, ha ha!

I – Ege malbona ŝerco, Francisko! Sed mi nun lasas vin, kaj mi iros al la papervendejo. Elĉerpiĝis la inko el mia globkrajono, kaj mi aĉetos ankaŭ kelkajn feltkrajonojn.

K – Ankaŭ mi ekiras, mi havas multe da lernendaĵoj. Ĝis baldaŭ, geknaboj!

D – Karina, atendu; mi akompanos vin al la studenthejmo. Mi prenos mian registrilon por la posttagmeza prelego.

## III. Konvinkaj argumentoj por resti en la studenthejmo.

**Karina (K) kaj Davido (D) babilas en la studenthejma ĉambro de Karina.**

D – Karina, saluton!

K – Saluton Davido, envenu!

D – Beletan ĉambron vi havas.

K – Jes, ĝi plaĉas jam ankaŭ al mi! Ĝi estas sufiĉe bone meblita; ne mankas eĉ pendigiloj en la ŝranko.

D – Krome vi lerte ornamis ĝin per bildoj, floroj, kaj buntaj kusenoj! Ĉu vi loĝas duope ĉi tie?

K – Jolanda loĝis kun mi, sed ŝi nun trovis privatan loĝigon, kaj lastsemajne ŝi jam pakis siajn aĵojn kaj foriris.

D – Ĉu ŝi estis malkontenta pri tiu ĉi ĉambro?

K – Tute ne, sed ŝi volis loĝi kun sia amiko.

D – Ho, do tiel... Fakte mi alvenis por demandi, ĉu vi havos tempon ĉi-vendrede?

K – Vendrede kutime mi veturas hejmen. Miaj gepatroj, foje nur la paĉjo veturigas min.

D – Foje vi povus fari escepton. Vendrede ni ludos korbopilkan matĉon kontraŭ la universitata teamo. Alvenu kaj entuziasmigu niajn ludantojn!

K – Bona ideo! Tiel mi telefonos al la panjo, ke mi reveturos hejmen nur vendredon vespere...

D – ... se vi ne volas poste festi kun ni, la gajnintoj!

K – Do, bone, mi petos la gepatrojn veturigi min hejmen nur sabaton.

D – Karina, mi povos helpi vin pri matematiko; sabaton ni kunlernu. Kaj por dimanĉo, sur la murtabulo estas





anoncita ekskurso al la proksima montaro; aliĝu ankaŭ vi, estos gaja kompanio tie!

K (ridete) – Vi konvinkas min restadi ĉi tie dum la semajnfino! Miaj gepatroj ege miros, ke mi nun ne insistas hejmeniri, ĉar komence mi ege kontraŭstaris fariĝi studenthejmulino!

## Taskoj


- I. 1. Legu la dialogojn, kaj post la unua legado provu rakonti en via gepatra lingvo (al via partnero, aŭ al vi mem, laŭte), pri kio temas la dialogoj!
  2. Substreku la nekonatajn vortojn, provu diveni la signifon, ekzemple tiel: “geedukada” – ge- / eduk/ad/a. Se tiel vi ne sukcesas, provu diveni la signifon laŭ la kunteksto! Turnu vin al la vortaro, nur se eĉ tiel vi ne povos solvi la taskon!
  3. Kolektu, laŭ la dialogoj, kiujn studobjektojn lernas, aŭ verŝajne lernas Karina!
  4. Kun via partnero formu “ĉu-demandojn” rilate la dialogojn, kaj respondu ilin, per (laŭeble) kompleta frazo. Estu ankaŭ demandoj, kiuj bezonas nean respondon! Ekzemple: “Ĉu la panjo de Karina proponis al sia filino kvarjaran gimnazion?”
- II. 1. Kolektu, kiujn studobjektojn vi havis en la bazlernejo kaj (se vi nun frekventas aŭ jam finis mezlernejon) en la mezlernejo!
  2. Vicigu, kiujn objektojn kaj lernilojn oni bezonas (aŭ verŝajne bezonas)
    - a) dum leciono pri matematiko,
    - b) dum kontrollaboraĵo pri literaturo en la gepatra lingvo,
    - c) dum leciono pri arta desegnado,
    - d) dum okupiĝo pri gimnastikado!

3. Preparu vian semajnan horaron en Esperanto!
4. Rakontu, sen citaĵoj, kio okazis en la unuopaj dialogoj, en pasinta tempo!

- III. 1. Skribu leteron al via amik(in)o, en kiu, a) post salutvortoj kaj ĝentilaj interesiĝoj, rakontu, b) ke ekde la nova lernoĵaro vi devas ŝanĝi la lernejon, ĉar c) vi havis konflikton kun unu el la instruistoj/profesoroj; kaj priskribu la problemon. Aldonu, d) ke vi eĉ (mal)ĝojas pro la lernejoŝanĝo, ĉar en la nova aldoniĝas nova lingvo, e) kaj la nova lernejo situas pli (mal)proksime, tiel ke vi devas alkalkuli ankaŭ la bezonatan tempon, vojaĝeblojn, vojaĝkostojn. Fine f) interesiĝu pri lia (ŝia) lerneja vivo, salutu la gepatrojn kaj adiaŭu! La letero estu proksimume en 15 – 17 linioj!
2. Prezentu (skribe aŭ parole) unu el viaj iamaj instruist(in)oj, laŭ la aspekto, karaktero, kial vi ŝatis aŭ malŝatis lin/ŝin!
3. Faru dialogon kun via lerno-partnero, en kiu vi ambaŭflanke interesiĝas pri la lernoĵaro, studobjektoj, geinstruistoj, lernejaj kutimoj (ekzemple deviga uniformo, sportado, religiaj devoj, ktp)! Se necese, eblas noti kelkajn vortojn antaŭ la komenco de la dialogo!
4. Faru dialogon kun via lerno-partnero pri la avantaĝoj kaj malavantaĝoj de studenthejma vivo!
5. Priskribu la edukan sistemon de via lando en 15 – 20 linioj! Kiaspecaj lernejoj estas, ekde kioma aĝo, kun kiaj kondiĉoj ili estas frekventeblaj? Ĉu, laŭ vi, estas proporcia la situo de la lernejoj, mezlernejoj, altlernejoj, universitatoj? Ĉu vi estas kontenta pri la edukasistemo, kial? Se ne, kiujn ŝanĝojn vi enkondukus?

# El mia kolora vivo

Verkinto kaj desegninto: Pavel Rak



Kolorigu: 1-ruĝa, 2-helblua, 3-helverda, 4-helbruna, 5-flava, 6-rozkolora, 7-bruna, 8-verda, 9-blua., 10-griza, 11-viola, 12-helgriza. Verku rakontojn pri tio, kio okazas sur la bildoj.



Renée Triolle

# Sukero: ĉu amiko aŭ malamiko?

Vi certe ŝatas manĝi bonbonon aŭ kukon kaj trinkas pli-malpli regule sukon, sodakvon aŭ kokakolaon. Ĉu vi scias, ke vi tiel manĝas pli da sukero, ol se vi mane prenus plurajn sukerkubetojn?

**E**n 1850 franco manĝis averaĝe 5 kilogramojn da sukero jare; en 1970 la jara konsumado altiĝis ĝis 35 kilogramoj!

**Kie kaŝiĝas sukero?** Jam 10 000 jarojn antaŭ nia erao, en Suda Azio kaj Pacifiko, niaj prauloj konstatis, ke kiam ili maĉas plantojn, venas sukera likvaĵo. Kaj ili konstatis, ke abeloj produktas bonan manĝaĵon, mielon. Nun el sukerkano, sukerbeto, agavo, acero, sorgo aŭ daktilo oni produktas sukeron aŭ siropon. En ĉiuj fruktoj kaŝiĝas sukero. Ĉu vi scias, kiu frukto estas la plej sukerplena? Daktilo! 27 gramoj da sukero en 100 gramoj da frukto. Preskaŭ duoble pli ol aliaj fruktoj. Imagu, kiam vi manĝas 100 gramojn da daktilo, vi manĝas 27 gramojn da sukero. Se vi manĝas vinberon, ĉerizon, figon aŭ bananon, vi manĝas inter 15 kaj 20 gramojn da sukero. En pomo, pruno aŭ piro 10-15% estas sukero; en oranĝo aŭ citrono kaj en ruĝaj beroj (fragoj, framboj) estas nur 7-10 %. Same en legomoj, terpomoj, nudeloj ktp, parto iĝas sukero dum vi digestas ilin.

**Kio bonas en sukero?** Sukero portas energion. Parto estas tuj produktita, alia



parto stokiĝas en la hepato kaj la muskoloj. Sportistoj scias, ke ili devas manĝi pastaĵojn (ekz. nudelojn) antaŭ sporta aranĝo, por havi pli da energio dum la konkuro.

La sukero helpas konservi fruktojn laŭ diversaj manieroj: marmelado, konfitaĵo, ĵeleo, pastaĵoj.

La sukero facile transporteblas; ĉu en pulvoro, ĉu en kubetoj (atentu ke formikoj ne malkovru vian pakon!). Jam 350 jarojn antaŭ nia erao la hindoj kapablis eltiri sukeron kaj transportis ĝin laŭ la sama vojo kiel la spicaĵojn. Eŭropo malkovris ĝin dum la mezepoko, kiam krucsoldatoj iris al Jerusalemo.

**Kio malbonas?** La ĝustan nivelon de sukero en la sango regulas pankreato. Se vi manĝas pli da sukero ol tiu organo povas pritrakti, aperas diversaj malsanoj: la plej konata estas diabeto. Sed pli kaj pli aperas ĉe infanoj kaj junuloj ankaŭ grasegeco, kiu mem kreos aliajn sanproblemojn. Ne parolante pri karioj en la dentoj!

Infanoj kaj junuloj estas viktimoj de industrio: sukero estas malmultekosta kaj donas agrablan guston, kaj sekve, industriistoj enmetas sukeron eĉ en produktojn kiel ŝinkoj, matenmanĝaj cerealoj kaj trinkaĵoj kiel malvarma teo!

**Konklude:** manĝu nur la necesan kvanton da sukero; trinku simplan akvon kaj ne prilaboritajn trinkaĵojn; manĝu panon kaj ne matenmanĝajn cerealajn; evitu prilaboritajn produktojn; uzu prefere mielon; elektu viajn fruktojn; trinku teon, kafon aŭ kakaon sen sukero kaj vi bone fartos, lasante al vi la plezuron manĝi kukon aŭ bonbonon de tempo al tempo!

Aranka Laszlo

# Per pentroarto al Esperanto

Emese Kovács Pécskai estas 19-jara, entuziasma junulino el Csantavér (Ĉantavir), en norda Vojvodino, Serbio. Ŝi tre sukcese kunligis Esperanton kun sia lerneja fako, hobia kaj estonta profesio: pentroarto. Ŝi ĵus finis la Politeknikan Lernejon, fakan mezlernejon en Subotica, Serbio. Tie ŝi estis membro de la Esperanto-fakrondo.



**D**um tiu tempo ŝi ne nur lernis la lingvon Esperanto, sed ankaŭ agadis multflanke. Ŝi helpis en la organizado de la KER-ekzameno (la ekzamenoj de UEA laŭ Komuna Eŭropa Referenckadro) en 2015, partoprenis la internacian dulingvan pentroartan konkurson kaj ankaŭ en la kreado de

logotipo por la Jaro de la Lernanto de ILEI.

En la konkurso de la Triesta Esperanto Asocio "Liliana Cerneca Soranzo 2015" ŝi gajnis la duan premion. La mesaĝo de ŝia verko estis (Esperante kaj hungare): "Savu vivon de la arbaro por viaj genepoj! – Mentsd meg az erdőt az unokáid számára!"



Fine de aŭgusto 2016 Emese kun du siaj amikinoj okazigis komunan ekspozicion de pentraĵoj en Subotica.



Ĉi-jare ŝia logotipo estis elektita por simboli la Jaron de la Lernanto de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kiu komenciĝis en julio, dum la 101-a Universala Kongreso de Esperanto en Nitro, Slovakio.

## Intervjuo kun Emese:

**A.L.: Rakontu al ni pri via renkonto kun Esperanto!**

Emese: La Politeknika Lernejo, kie mi lernis en la grafika dezajna fako, hejmgis ankaŭ la fakrondon de Esperanto. Pro mia multflanka interesiĝo mi deziris konatiĝi ankaŭ kun tiu ĉi lingvo, kaj pere de tiu malfermiĝis nova pordo antaŭ mi, plena je eblecoj.

**A.L.: Kion signifas por vi Esperanto?**

Emese: Por mi ĝi estas pli ol unu simpla lingvo. Danke al mia instruistino plivastiĝis miaj scioj, kaj mi povis burĝoni kaj displekti mian pentruartan talenton.

**A.L.: Kaj pentruarto?**

Emese: Baze de pentruarto mi planas konstrui parton de mia vivo. Laŭ mi tre gravas la celoj, revoj, sed ankaŭ la persisto. Mi jam atingis kelkajn elstarajn rezultojn en pentruarto, kaj pro tio mi scias, ke tio estas mia vojo, kaj ke mi havas taskon rilate al tio. Mi klopodas fari ĉion necesan, por ke mi disvolvu miajn sciojn al la plej alta nivelo.

**A.L.: Kion vi opinias pri la ligo inter tiuj du, Esperanto kaj pentruarto?**

Emese: Ju pli da lingvoj ni konas, des pli ni riĉigas nian personecon, kaj ankaŭ ricevas eblecon konektiĝi kun pli multe da homoj. Tio ege gravas por mi, ankaŭ rilate al miaj planoj por la estonteco, inkluzive la kampon de arto.

**A.L.: En junio vi finis la mezlernejon,**

**kaj vi daŭrigus viajn studojn en Hungario. Ĉu Esperanto troviĝas en viaj planoj?**

Emese: Jes, kompreneble. Kvankam mi ĝenerale ne majstras pri fremdaj lingvoj, sed se mi bezonus mezgradan lingvoatestilon por diplomiĝo en fakultato, mi elektus Esperanton.

**A.L.: Kion vi mesaĝas al la hodiaŭaj gejunuloj?**

Emese: Mi apartenas al tiu ĉi juna generacio kaj ni estas kaptitoj de la virtuala mondo. Tamen, mi opinias, ke spite al tio, ni havas eblecon, kien kaj al kio strebi, eble al iu nova lingvo.


Danke al Esperanto Emese sukcesis en sia lernejo gajni la titolon "Lernanto de la Generacio 2012-2016". Krome, fine de aŭgusto, ŝi kun du siaj amikinoj okazigis komunan ekspozicion de pentraĵoj en Subotica.

Sekvinda ekzemplo! Gratulojn al ŝi!



# Amiko fidela estas trezoro plej bela

La rubrikon prizorgas Mónica Molnár




**La spac-ŝipo trankvile atingis la Teron, la Kontinenton, la Landon kaj fine la Urbon. Ĉio iris glate. Tiom glate,**

**ke eĉ Timemulido alteriĝis tute trankvila, sen paniki, sen kribi, sen plori. Kiel tio eblas? Li, kiu tiom multe timis. Fakte, la Ulidoj trovis tre efikan artifikon!**

**S**e vi bone memoras, ili ĵus volis festi, kiam Timemulido ekkriegis pro la terura koŝmaro. Do, ili rapide kaj tre lerte elturniĝis kun 3 alumetoj kaj unu olivo, kiujn ili trovis en la kuirejo. Ili konstruis enigmon por Timemulido, kiu tiom forte deziris trovi la solvon, ke li forgesis pri ĉio ĉirkaŭ si. Ĉu vi sukcesus solvi ĝin pli rapide ol nia amiketo? Jen ĝi. Provu!

La tasko estas: Jen olivo en glaso. Movu nur du alumetojn



por ke la olivo troviĝu ekster la glaso. Ĉu vi sukcesos pli rapide ol Timemulido?

Ĉiuokaze, li laboris pri tiu ĉi enigmo ĝis la surteriĝo de la spac-ŝipo. Li eĉ ne havis tempon por timi, la pordoj jam malfermiĝis kaj ekstere... Ho, kia ĝojo! Ĉiuj gaje atendis ilin: Avo Maljunulo, Avino Maljunulino kun la hundino Fidelulino kaj la kvar ĉarmaj hundidoj. La Ulidoj estis kontentegaj kaj ĵetis sin en la brakojn de la geavoj. Kompatindaj maljunuloj, apenaŭ ili povis resti sur siaj piedoj kaj brakumi unu post la alia ĉiujn Ulidojn. Ankaŭ la hundidoj ricevis multajn brakumojn, karesojn, kiuj evidente ekscitis la etajn "pilketojn" kaj ilia ĝojdanco fariĝis ankoraŭ pli frenezeta. Estis Karesemulido, kiu komencis

nomi ilin "pilketoj", ĉar ilia plej kara ludo estis "Mi kaptos mian voston" kaj dum tiu tre intensa okupiĝo ili kuris tiom rapide ĉasante sian voston, ke oni povis vidi nur etajn, ruliĝantajn pilketojn. La sceno estis tre amuza kaj kun ne malmulte da peno, sed finfine oni tamen sukcesis enaŭtigi ĉiujn por fari la lastajn kilometrojn aŭte ĝis la hejmo.









La Ulidoj tre ĝojis retrovi la hejmon, siajn ĉambrojn, la postlasitajn aferetojn, ludilojn, belajn librojn kaj... Kaj en la salono la tablo estis preparita por granda festo! Estis tie ĉio, kio povas plezurigi la aventuremajn Ulidojn: sandviĉoj, fruktoj, etaj kukoj, grandaj tortoj, sukoj, bongustegaj trinkaĵoj kaj en la mezo la geavoj instalas la projekciilon, do atendeblis surpriz-filmo. Fakte, la projekciilo estis tiom granda, ke oni instalas ĝin ne tre-tre ofte, nur je grandaj eventoj, kiel naskiĝtagoj, festoj, vizitoj de gastoj. Scivolemulo kaptis la brakon de Avo Maljunulo kaj senpacience volis tuj scii, pri kiu historio temas.

– Mia kara Avĉjo, – komencis Scivolemulo la strategian

demandon – *diru al mi, kion ni vidos? Kiun belan historion vi preparis por ni? Ho, viaj belegaj historioj tiom multe mankis al ni sur la Luno! Vi eĉ ne povas imagi tion!*

– Kara nepo mia, kun Avino Maljunulino ni longe serĉis la plej taŭgan rakonteton por tiu ĉi reunuiĝo, kiun ni tiom longe atendis foje pacience, foje malpacience. Ni multe elektadis, sed mi kredas, ke ni trovis samtempe belan kaj interesan rakonton de Kira Maire [*'kira mer'*]. Mi tre ĝojas, ke ŝi sendis ĝin al ni kaj mi esperas, ke ĝi atingos multajn personojn, por ke ĉiuj konsciiĝu pri la gravecoj de amikeco kaj de la homaj rilatoj. Voku ĉiujn al la salono kaj ni tuj komencos la projekciadon. Bonan spektadon!

|                                                                                   |                                                                                                                                                             |                                                                                                                                                 |
|-----------------------------------------------------------------------------------|-------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|-------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|
|  |                                                                           |                                                              |
| <p><b>Kira Maire:<br/>Mi kaj Vi</b></p>                                           | <p>Estis bela, suna tago kaj Mi sidis sur la balancilo. Ĉio estis bela, tamen io mankis al Mi:<br/>– <i>Mi estas Mi kaj mia vivo estas bela, sed...</i></p> | <p>Mi sentis sin sola... Mi havis ĉion, kio povas plibeligi la vivon, sed kun neniu Mi povis dividi tiun belan vivon kaj tio tristigis Min.</p> |

|                                                                                                                                                                                         |                                                                                                                                                                                   |                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                           |
|-----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|-----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|---------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|
|                                                                                                       |                                                                                                 |                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                         |
| <p>Mi ne sciis, ĉu ekzistas persono, kiu povus esti amiko de Mi? Multe da tempo pasigis Mi sen renkonti iun ajn.</p>                                                                    | <p>Mi rigardis la forajn montojn kaj hezitis, ĉu valoras forlasi la belan hejmon por serĉadi nekonaton en nekonataj lokoj? Mi ekpaŝis...</p>                                      | <p>... kaj plu paŝis, sed Mi ne trovis amikojn kaj Mi tristis kaj ploris. Mi bedaŭris jam la forlasitan hejman komforton kaj Mi ekhavis tristajn pensojn.</p>                                                                                                                                                                                                                                                             |
|                                                                                                     |                                                                                               | <p>Kelkaj Ulidoj havis larmojn en la okul-anguloj je la fino de la filmeto, sed ĉu larmoj aŭ ne, ĉiuj komprenis, senescepte, ke la feliĉa vivo ne dependas de la loko, kiom ajn bela ĝi estu, sed de proksimeco de amikoj. Ili ĉiuj tre kontentis kaj sciis, ke la hejmeniro estis ilia plej bona decido dum la lastaj monatoj.</p>  |
| <p>Mi sentis sin sola. Tre sola. Tro sola. Subite, kiel miraklo alpaŝis kaj alparolis Min iu kaj diris: – <i>Mi estas Vi. Mi estas sola kaj trista. Ĉu vi volus esti mia amiko?</i></p> | <p>Apenaŭ Mi povis kredi la okulojn kaj tuj diris: – <i>Jes! Mi jam preskaŭ forlasis ĉion, sed mi ĝustatempe trovis Vin!</i> Hodiaŭ Mi kaj Vi estas amikoj kaj vivas feliĉaj.</p> |                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                                           |





# Matenadaran: La plej granda kaj la plej malgranda libro



**La komenco de tiu kolekto de la biblioteko Matenadaran (armenlingve tiu vorto signifas kolekto de manuskriptoj) je la nomo de Mesrop Maŝtoc, kreinto de la armena alfabeto, okazis en la kvina jarcento en la urbo Eĉmiadzin.**

**E**n 1939 ĝi translokiĝis al Erevan, la ĉefurbo de Armenio kaj fariĝis kaj muzeo kaj scienc-esplora instituto.

Matenadaran nun enhavas 18 500 manuskriptojn, el kiuj 14 500 estas armenlingvaj kaj 100 000 estas arkivaj dokumentoj. En la tuta mondo ekzistas pli ol 30 000 armenaj manuskriptoj.

Ekde la jaro 1940 ĝi eldonas “Matenadaranan informilon”, armenlingve, kun traduko al la rusa kaj la franca lingvoj.

En Matenadaran estas du interesaj eksponaĵoj: la plej granda kaj la plej malgranda libroj de tiu giganta kolekto. Ilia historio estas sciinda.



La plej granda, kies nomo estas “Predikoj”, estas el la jaro 1202, pezas 27,5 kilogramojn, enhavas 607 paĝojn, havas dimensiojn 71x52 cm, estis skribita de monaĥo Vardan dum 3 jaroj. Ĉiu paĝo estas farita el led de unu bovido. Dum la sama jaro Armenio estis atakita de malamikoj kaj la libro falis en la manojn de muzulmana juĝisto. Armenaj monaĥoj el urbo Mush kolektis oferojn kaj elaĉetis ĝin de juĝisto. Tragedia evento por armenoj okazis en la jaro 1915. En tiu momento la pezega libro estis konservita en monaĥejo. Forkurante de masakro du armeninoj kunprenis ĝin, duoniginte ĝin pro la tro alta pezo. Poste la libro trairis de mano al mano. Unu parto alvenis en Eĉmiadzin, la religia ĉefurbo de Armenio, kristana lando. Post longa tempo troviĝis, hazarde, la dua parto, en la korto de armena preĝejo apud la urbo Erzerum. Post longaj jaroj de migrado ambaŭ partoj estas nun en Matenadaran. En la librego mankas 17 paĝoj: 16 nun troviĝas en Venecio, unu en Vieno. En 1976 du paĝoj de la libro estis trovitaj en Ruslando en moskva biblioteko kaj transdonitaj al Matenadaran.

La plej malgranda libro de Matenadaran, “Kalendaro” el la jaro 1400, pezas 19 gramojn, havas la dimensiojn 4x3 cm, konsistas el 104 paĝoj; la personoj, kiuj faris tiun juvelon, uzis ledon de nenaskita kaprido, por atingi tre malaltan pezon.

Lida Elbakyan

# Flegejo por sovaĝaj bestoj

**En Finnlando la flegejoj por sovaĝaj bestoj laŭeble similas al la natura ĉirkaŭaĵo de la bestoj kaj situas en arbaro subĉiele.**

**L**a alkido en la foto nomiĝas Mervino. Ĝi havas jam 14 monatojn kaj povas nutri sin en la arbaro, sed ĝi ankoraŭ bezonas ŝirmon. Kiam oni trovis ĝin, ĝi aĝis apenaŭ unu tagon. Sen sia patrino ĝi mortus, se homo ne savus ĝin. Ni ne scias, kial la patrino lasis ĝin sola. Ĉu la alkopatrino mortis en kolizio kun iu aŭto, aŭ ĉu ŝi havis ĝemelojn kaj ne povis prizorgi kaj mamnutri du idojn? Tiukaze unu ido restas sola kaj mortos.

La homo, kiu trovis la alkidon, portis ĝin al flegejo por sovaĝaj bestoj. La flegejon fondis geedza paro, kiu dediĉas sin al bestokuracado. Ĉion ili mem pagas, kaj la fakturo pri la manĝaĵoj por iliaj bestopacientoj estas trioble pli granda ol tiu por ili mem. La alkidon ili unue nutris per kaprina lakto, ĉiun duan horon. Post kelkaj semajnoj ili kondukis ĝin al barita ŝirmejo en la arbaro, kiu ĉirkaŭas ilian domon. Tie Mervino povas mem nutri sin per pingloj de pino, folioj, per io ajn, kion ĝi ŝatas. Ĝi trinkas akvon el lago, havas sian privatan lagobordeton. Ĝi rapide kreskas. Oni neniam povos liberigi ĝin, ĉar alkoj, cervoj kaj aliaj rangiferoj kvazaŭ enamigis al sia unua flegisto. Oni diras, ke kiu ajn estas la unua estaĵo, kiun la ido vidas, la ido sekvas tiun nesepareble. Mervino neniam lernos eviti homojn, kaj se ĝi estus libera, ĝi povus aliri homojn, kiuj ege timiĝus kaj mortigus ĝin. Plenkreska vir-alko pezas eĉ 600 kilogramojn, ankaŭ alkino estas timinda. Ĉasistoj havas permeson mortpafi certan



nombron de alkoj ĉiuaŭtune, por malpliigi koliziojn en trafiko kaj la damaĝadon de arbetoj, kiujn homoj plantis por industrio kaj ekonomia profito. Homoj ne mortpafos Mervinon, se ĝi restas en sia ŝirmejo, sed kiam ĝi estos plenkreska, ĝi allogos ardajn vir-alkojn, kiuj rompos la barilojn kaj kaŭzos grandajn damaĝojn. Kiam plenkreska Mervino eniros iun zoon, mortopafon jam decidis la flegisto, kvankam li ege ŝatas sian pacienton.

En la sama flegejo, kie loĝas Mervino, kuraciĝas ankaŭ maraglo, kiu perdis sian flugopovon pro la plumbo en la fiŝoj, kiujn ĝi manĝis. Ĝi perdis tro da gravaj plumegoj de la flugiloj pro la plumbo-veneniĝo. Nun la flegisto nutras ĝin per senplumbaj fiŝoj kaj viando. Ĝi loĝas en kaĝo, kvankam ĝi ankoraŭ ne povas flugi. Kiam ĝi estos sana, ĝi estos libera kaj portos kameraon surdorse, por doni al homoj bildojn pri la vivo de maraglo en naturo.

En la flegejo oni kuracas ankaŭ gufon, al kiu tordiĝis grava ungo pro kolizio kun io. Ĝi nun ne povus mem kapti predon. La flegistoj splintis kaj bandaĝis la ungon. Krome ili masaĝas kaj donas fizioterapion al la birdo.

Se vi iam trovos elnestiĝintan senhelpan birdidon, sciur-idon aŭ orfan leporidon, ne imagu, ke vi ĝin flegos kaj sanigos. Ne provu kapti ĝin. Ĝiaj gepatroj, almenaŭ la patrino, gvatatas proksime kaj provas zorgi pri la ido. Ili scias tion fari pli bone ol homoj. Tiun konsilon donis al mi la flegisto de Mervino.


Raita Pyhälä





# Legu kaj ĝuu

Rubrikestro: Małgosia Komarnicka,  
ul. Kilińskiego 14/3,  
PL-59-300 Lubin,  
Pollando, rete:  
*malgosia.*  
*junaamiko@gmail.com*



## Ne ĉiu povas fariĝi tradukisto

**Mi estas certa, ke ĉiu el vi iam legis malbone tradukitan tekston.**

**Ĉ**iu povas ellerni fremdan lingvon, sed ne ĉiu povas fariĝi tradukisto. Tradukisto estas persono, kiu konas perfekte almenaŭ du lingvojn kaj tradukas el unu lingvo al la alia. Pli da detaloj pri tiu fako vi ekscios legante intervjuon kun Dietrich Michael Weidmann, la tradukisto de du rekomenditaj libroj pri Heidi.

Dum evoluo de la civilizacio unue estis la lingvo kaj nur poste aperis la skribo; do buŝa traduko estis certe pli frua ol la skriba. Personoj, kiuj tradukas buŝe, rekte dum ekzemple internaciaj konferencoj, nomiĝas interpretistoj. Tradukistoj kaj interpretistoj estis kaj estas ŝlosilaj personoj dum internacia komunikado. Ili ofte estas subtaksitaj kaj ilia laboro estas ege grava precipe en la epoko de progresanta tutmondiĝo.

En la jaro 1953 estis fondita Internacia Federacio de Tradukistoj, kiu en la jaro 1991 rezoluciis Internacian Tagon de Tradukistoj por esprimi solidarecon kun ĉiuj tradukistoj en la mondo kaj antaŭ ĉio turni atenton al ilia grava laboro. La Internacian Tagon de Tradukistoj oni celebras ĉiam la 30-an de septembro en la tago de sankta Hieronimo, kiu fariĝis patrono de tradukistoj. La sankta

Hieronimo estas ja unu el la plej konataj tradukistoj en la historio. Li interalie tradukis la Biblion en la latinan (La Vulgato).

## Klubo de bona libro

**L**a Biblioteko de *Juna Amiko* por junuloj kaj infanoj kreskas dank' al viaj proponoj. Bonvolu sendi viajn proponojn pri libroj, kiuj montras pozitivajn valorojn (ekzemple toleremon, amikecon, apogon al malpli fortaj homoj), helpas kompreni vin mem kaj aliajn, kaj ebligas adaptiĝi al nia iom malgaja realeco. La proponojn kun la titolo, aŭtoro kaj mallonga rekomendo sendu al la supra adreso, aldonante la noton: Biblioteko de *Juna Amiko*.



## Rekomendo

Por la Biblioteko de *Juna Amiko* Dietrich Michael Weidmann (sur la foto), lingvosciencisto, esperantologo, tradukisto, ĵurnalisto kaj verkisto, rekomendas la de li tradukitajn du librojn pri "Heidi" de Johanna Spyri, kiuj jam estas haveblaj en Esperanto. La unua libro "La migro – kaj lernoĵaroj de Heidi" en la germana originalo aperis en 1880. Ĝi rakontas historion de la alplanda orfinfano Heidi. Heidi de sia onklino estis portita al la alpopaŝta kabano de la avo, la tiel nomita Alponĉjo. Li estis strangulo, vivanta sola sur sia alpopaŝtejo, malkontenta pri la homoj kaj ilia malboneco. Dank' al la ama malfermiteco de la infano li retrovas sian kredon al Dio kaj la homoj. Sed tiam la onklino reaperas kaj forportas la infanon, ĉar ŝi ricevis monon de riĉega, nobela familio el Frankfurto. Heidi en Frankfurto devis fariĝi kunulino de la lama filino de la domo Sesemann. Heidi en la fremdejo malsaniĝis kaj fine preksaŭ morta devis reveni hejmen al la alpopaŝtejo, por resaniĝi.

La dua volumo "Heidi povas apliki, kion ŝi lernis" rakontas kiel la knabino, kiu en la fremdejo lernis multon, nun revenas kaj ŝanĝas la homojn ĉirkaŭ si. La izolita Alponĉjo revenas al la homoj, Kapro-Petro lernas legadon, la blinda avino refariĝos hela en sia koro, kaj fine la lama Klarinjo, kiu vizitas Heidin sur la Alpopaŝtejo, resaniĝas de sia lameco kaj relernas piedpaŝi.

La rakonto, kiu estas plena de vivosaĝeco kaj amo, estas kvazaŭ svisa mito: Heidi, la feeca knabino, kiu atingas liberecon per studado, lerninte kaj poste instruante la legadon, estas kvazaŭ la kontraŭ-poluso al la vira heroo Vilhelmo Tell, kiu defendas la liberecon per arbalesto<sup>1</sup>. Tiuj du figuroj kune estas simboloj de svisa identeco kaj samtempe figuroj por monda identeco kaj bildo, kiun la mondo havas pri Svislando. Ĝis nun la

libroj de Heidi ekzistis jam en 52 lingvoj kun kompleta eldonkvanto de pli ol 50 milionoj da ekzempleroj. Kun la Esperanto-traduko la rakontoj de Heidi nun ankaŭ fariĝis parto de nia Esperanto-literaturo kaj elemento de nia Esperanto-kulturo.

La du Heidi-libroj aperis en la eldonejo Allsprachendienst Esperanto GmbH en Uster (Zuriko), Svislando:

Heidi I: "La migro – kaj lernoĵaroj de Heidi" de Johanna Spyri, Esperanto-traduko de Dietrich Michael Weidmann, ISBN 978-3-9524594-0-9, formato A5, kolora kovrilpaĝo de Linda Mihaela Weidmann, 100 paĝoj, prezo EUR 20.-

Heidi II: "Heidi povas apliki kion ŝi lernis" de Johanna Spyri, Esperanto-traduko de Dietrich Michael Weidmann, ISBN 978-3-9524594-1-6, formato A5, kolora kovrilpaĝo kaj mangao de Linda Mihaela Weidmann kaj originalaj ilustraĵoj de Rudolf Geissler, 100 paĝoj, prezo EUR 20.-

La libroj mendeblas ĉe: Svisa Espero, Poŝtfako 26, CH-8613 Uster 3, *svisa-espero@esperanto.ch*

## Intervjuo kun Dietrich Michael Weidmann, la tradukisto de la libroj pri Heidi.

**Kio kaŭzis, ke vi komencis lerni Esperanton?**

Tio fakte estis diversaj elementoj – mi eksciis pri Esperanto en mia infaneco unue el artikolo en iu kalendaro por gejunuloj, kaj aliflanke el legantletero de la sciencfikcia serio Perry Rhodan. Kiam mi komencis en la aĝo de 13 jaroj okupiĝi pri Esperanto, mi eksciis de mia avino, ke ŝia patro estis fervora esperantisto (mi poste eltrovis, ke li estis kunfondinto de Esperanto-Societo Zuriko kaj fondis la Esperanto-grupon en Rohrbas-Freienstein – do Esperanto efektive jam estas afero de mia familio. Ankaŭ mia patro poste lernis la lingvon). Tamen daŭris ĝis 1977 kiam mi la unuan fojon havis kontakton kun Esperanto-Societo Zürich. La ŝlosila

1) Arbalesto: pafilo kun arko kaj risorto.



elemento estis tamen mia unua partopreno en la IJK en 1979 en Austerlitz. Kiam mi superis la aĝlimon de 30 en 1990, mi tiam neniam plu maltrafis IJK-n. De 1986 ĝis 1990 mi estis ĝenerala sekretario de TEJO.

**Ĉu mi bone komprenas, ke havante tiel belegan Esperanto-tradicion vi ne estas denaskulo? Ĉu neniue en via familio provis instigi vin lerni Esperanton?**

La instigon lerni Esperanton fakte mi trovis ekster mia familio, sed la kosmopolita pensaro ja havis tradicion en mia familio...

**Kial vi elektis por traduki la librojn pri Heidi?**

Heidi fakte estas la plej konata kaj plej multe legita kaj tradukita infanlibro de Svislando entute. Ĝi ĝis nun ekzistis en 52 lingvoj (kun Esperanto nun estas 53), kun tuta eldonkvanto de pli ol 50 milionoj da ekzempleroj, kaj apartenas al la 100 plej multe konataj libroj de la mondo entute. La rakonto de Heidi peras gravajn edukajn valorojn – temas pri la historio de orfinfano, kiu estis portita de sia onklino al la alpopaŝtejo de sia avo kaj poste estis vendita al riĉa nobela familio en Frankfurto, kie ŝi grave malsaniĝas de hejmsopiro. Fine Heidi revenas al sia hejmlando, kaj en la dua volumo la lama filino de la germana familio venas al la alpopaŝtejo kaj tie saniĝas, kaj la knabino Heidi instruas al sia kunulo la Kapro-Petro legadon kaj skribadon. La verko jam delonge devintus ekzisti en Esperanto; do mia traduko ŝtopis gravan truon en nia literaturo.

**Kiom da tempo vi bezonis por prepari tutan tradukon de la libroj “Heidi”?**

Mi bezonis po unu monaton por ĉiu el ambaŭ volumoj, do entute du monatojn.

**Vi fondis sian tradukentreprenon... Priskribu ĝian rolon.**

Tion mi povas facile respondi: Nur de Esperanto nuntempe ne eblas por mi pergajni mian panon. Tamen dank'

al Esperanto mi intimiĝis pli kaj pli kun lingvoj kaj fine ja studis ĝeneralan lingvosciencan kaj dum la studado trovis laboron ĉe tradukentrepreno. Kun la posedantino de tiu entrepreno mi restis ĉiam en bona rilato kaj kiam ŝi mortis en 1992, mi fondis mian propran tradukentreprenon, povante transpreni parton de ŝiaj klientoj. Dank' al miaj rilatoj en la Esperanto-movado mi povis ankaŭ trovi kunlaborantojn en la tuta mondo por la plej diversaj lingvokombinoj.

**Via historio konfirmas utilecon de Esperanto. Ĉu mi povas prezenti ĝin precipe al tiuj, kiuj opinias, ke pere de Esperanto ne eblas salajri eĉ malmulte?**

Memkompreneble vi povas tion prezenti.

**Kiajn ecojn de karaktero devas posedi tradukisto aŭ kiaj ecoj estas bezonataj por bone traduki?**

Tradukisto devas esti homo, kiu atentigas pri detaloj, havas bonegajn konojn ne nur de la lingvoj el kaj al kiuj li/ŝi tradukas, sed tradukisto devas havi konojn je nivelo de denaska lingvo de la cellingvo, kaj ja estas bezonata alta edukado prefere universitata. Por tradukado ne sufiĉas simple bone koni du lingvojn, sed oni devas havi profundajn konojn pri la funkciado de lingvoj kaj kompreni, ke vorto en unu lingvo ne estas vorto en alia lingvo. Tradukisto devas esti kapabla pensi multdimensie kaj nepre bone kompreni, kion li tradukas. Do tradukisto devas konstante plustudi kaj lerni dum sia tuta vivo. Se tradukisto ekzemple tradukas faktekston el medicino, tiam li devas same bone kompreni tiun temon kiel kuracisto, por doni nur unu ekzemplon. Multflanka tradukisto do devas esti fakulo en tre multaj kampoj.

**Kion vi ŝatas kaj kion vi ne ŝatas en la laboro de tradukisto?**

En la tradukista laboro mi ŝatas, ke oni ekscias multajn aferojn kaj konstante lernas kaj ke oni peras inter homoj kaj kulturoj.

**Kiel aspektas tipa tago de tradukisto, Dietrich Michael Weidmann?**

Tio estas tre malfacile direbla, ĉar tipa tago ne ekzistas. Ĉar mi ja estas mia propra entreprenisto, mi ne nur devas okupiĝi pri la tradukado, sed ankaŭ pri la trovado de laboro kaj tio ne ĉiam facilas, ĉar konkurenco estas granda kaj bedaŭrinde pli kaj pli homoj kaj entreprenoj ne estas pretaj pagi al tradukistoj tiom, kiom ilia laboro valoras. Ofte klientoj mem ne komprenas, kiom malfacila laboro estas bona traduko kaj tiam simple serĉas la helpon de tradukistoj, kiuj ne estas sufiĉe edukitaj kaj pretas labori je malalta prezo – ĉar la klientoj ja ofte ne konas la fremdan cellingvon, al kiu la teksto devas esti tradukita, ili ofte nur poste rimarkas, ke tia decido estis katastrofa eraro. Poste tiuj samaj klientoj revenas ofte kun tiaj fuŝaj tekstoj kaj petas de mi, ke mi nun riparu tiun fuŝon, memkompreneble volante pagi eĉ malpli, ĉar ili ja jam havis kostojn por la fuŝo... Ke riparo de fuŝa traduko donas pli da laboro ol komplete retraduki la tekston estas tiam alia temo...

**Donu tri aŭ kvar konsilojn al tiuj, kiuj deziras fariĝi tradukistoj.**

Unua konsilo: Konsciu, ke nuntempe estas malfacile vivi de tradukado. Precipe se vi tradukas al aŭ el la angla, la konkurenco estas giganta. Se entute vi volas vivi de tradukado, vi devas havi apartajn konojn kaj prefere kapabli traduki en tiel nomataj “ekzotikaj” lingvokombinoj (do el kaj al lingvoj, kiujn ne ĉiu duonklerulo eklernis). Ankaŭ gravas, ke vi specialiĝas en unu aŭ pluraj fakoj, ĉar oni ja bezonas kvalifikitajn faktradukistojn. Tiam vi nepre bezonas universitatan edukadon (bakalaŭro, magistro aŭ eĉ doktoro) en la lingvoj, el kaj al kiuj vi tradukas kaj en la fakoj, pri kiuj vi okupiĝas. Literatura traduko estas alia afero, ofte ja eblas tion fari nur kiel hobion, aŭ oni devas trovi subvenciantojn, kiuj pretas pagi vian laboron. Kun Esperanto-tradukoj ja nuntempe apenaŭ eblas gajni monon. Tamen

ankaŭ por hobiaj tradukoj validas la tute samaj kriterioj kiel por profesiaj rilate al la kvalito. Grava ankaŭ estas, ke bona traduko ĉiam devas esti kontrolita de aliaj homoj. Mi havis du tre bonajn esperantistojn, kiuj rekontrolis la du Heidi-librojn, sed eĉ malgraŭ severaj kontroloj tamen ne eviteblis, ke kelkaj eraretoj postrestis... – tio ja montras, kiel malfacile estas traduki.

**Ĉu vi jam preparas sekvan tradukon?**

En mia entrepreno, tio memkompreneble estas teknikaj gvidlibroj por diversaj firmaoj kiel ekzemple la svisa poŝto. En Svislando ja la ĉefaj bezonataj lingvoj estas la naciaj lingvoj germana, franca kaj itala, kaj do la plej grandaj volumoj de nia komerca laboro estas tradukoj de la germana al la franca kaj itala kaj reciproke. Krom tio estas regule bezono de tradukoj el kaj al la angla, hispana, portugala, rusa, japana, ĉina, nederlanda, hungara, pola, tajlanda, araba, kutime el kaj al la germana, franca aŭ itala kaj foje ankaŭ aliaj lingvo-kombinoj. Foje ankaŭ venas petoj pri Esperanto kaj la romanĉa, tamen de tio ne eblas vivi nuntempe.

En Esperanto mi planas nun en kunlaboro kun Svisa Esperanto-Societo la tradukon de alia grava svisa infanlibro, nome la libro “Sonoril-Urĉjo” el la romanĉa originalo “Uorsin”. Plej konata estas la germanlingva versio “Schellen-Ursli”, de kiu lastjare aperis sukcesega kinofilmo.


**Via blogo (<http://informejo.ch>) havas belan transsendon: “Vizioj, ideoj kaj instigoj por pli bona mondo”.**

...kion mi aldonu: Legu la verkaron pri hilelismo kaj homaranismo de Zamenhof, miaj idealoj, ideoj kaj konceptoj plejparte kongruas kun tio, aldoniĝas la elemento pri protekto de nia biosfero kaj egaleco de viroj kaj virinoj, problemoj, pri kiuj oni ne tiom konsciis en la epoko de Zamenhof...

**Mi kore dankas kaj deziras samajn sukcesojn.**

# Ekkonu mian landon pere de ĝiaj legendoj

Konkurso ne nur por junaj legantoj



**Ĉi-numere mi proponas reveni al Brazilo okaze de la 31-a Somera Olimpiado, kiu okazis en Rio-de-Ĵaneiro kaj daŭris de la 5-a ĝis la 21-a de aŭgusto. Rigardante olimpiajn ludojn vi havis ankaŭ eblecon admiri la antaŭan ĉefurbon de Brazilo kaj mi nun prezentos al vi du belajn lokojn de tiu lando: la novan ĉefurbon de Brazilo kaj Bonan Esperon.**

**A**prile mi vizitis tiujn belajn lokojn kaj rekomendas ilin al vi. La ĉefurbon pro tio, ke ĝi estas vere unike konstruita, kaj Bonan Esperon pro tio, ke ĝi estas magia loko, kiun ĉiu esperantisto devus enskribi en sian vojaĝkalendaron. Kiel kutime, unue per kelkaj informoj konatiĝu kun de mi rekomenditaj lokoj. Klopodu trovi ilin sur la mapo kaj poste faru konkursajn taskojn.

La 21-an de aprilo 1960 Brasilia (Esperante Braziljo) fariĝis la nova ĉefurbo de Brazilo. Ĝi do havas nur 56 jarojn, sed la ideo konstrui novan ĉefurbon ekestis jam en la 18-a jarcento. En la jaro 1956, dank' al la tiama prezidento Juscelino Kubitschek, estis anoncita urboplanada konkurso. Du brazilaj arkitektoj, Lucio Costa kaj Oscar Niemeyer, eluzis la plej modernajn solvojn, kiuj estis aplikitaj en urboplanado kaj konstruado. Tiumaniere la arkitekturo de la ĉefurbo karakteriziĝas per futurismaj konstruaĵoj el vitro, marmoro kaj ŝtalo, sed ne mankas ankaŭ multe da arboj kaj herbejoj.

La plano de la urbo similas al aviadilo aŭ fluganta kondoro. Laŭlonge de la

du "flugiloj" situas loĝkvartaloj. Sur la (imagita) kabineto de la aviadilo troviĝas la bela placo de la tri povoj (leĝdona, ekzekutiva, jura) en tri gravaj palacoj – la parlamento (deputitejo, senato), la prezidenta sidejo kaj la supera kortumo. Ĉeokaze oni kreis la belegan artefaritan lagon Paranoá (48 km<sup>2</sup>), kiu estas ankaŭ unu el gravaj allogaĵoj de la urbo.

La celo de la arkitektoj, kiuj planis kaj konstruis la ĉefurbon, estis neceso garantii al la loĝantoj sunon, verdaĵojn, spacon kaj koncentrigi kvartalojn de la urbo (komercan, administran, hotelan, entreprenan...).

La arkitektoj planis la ĉefurbon kiel idealan aglomeradon kaj ja idealaj urboj ne ekzistas. Ili malgraŭ tio celis la perfektecon, foje forgesante pri estonta loĝanto de la urbo, ekzemple ne planante trotuarojn kaj do perpieda vizitado de la urbo estas tre malfacila. Hodiaŭ tiu urboplanisma eksperimento estas de multaj kritikata, sed ni memoru, ke la nova ĉefurbo de Brazilo komence de la 20-a jarcento ankoraŭ ne ekzistis. Ĝia unika arkitekturo kaŭzis, ke la urbo estas enskribita en la liston de la Mondaj Kulturaj Heredaĵoj de Unesko.

La urbon Brasilia vi nepre devas viziti por mem konvinkiĝi, ke tio estas urbo de multaj kontrastoj: betono kaj arboj kaj herbejoj, kuraĝa arkitektura impeto kaj oferdono de laboristoj, romantika legendo de ekesto de la urbo kaj politikaj decidoj de ĝia disvolvo ...

Vizitante la ĉefurbon, ĉefverkon de modernismo, vi nepre interalie devas viziti futurisman konstruaĵon de la Parlamento, kiu similas al granda pesilo,



Katedralo

katedralon kun la formo de dorna krono, la ponton de Juscelino de Kubitschek, Palacon de Tagiĝo (oficiala loĝejo de la prezidento de Brazilo), maŭzoleon de J. Kubitschek kaj belegan kun bluj kolorvitraĵoj adorejon je la nomo de la sanktulo Don Bosco.

La novan ĉefurbon Braziljon oni konstruis dum rekorda tempo, en 3,5 jaroj kaj tiumaniere plenumiĝis profeta sonĝo de sankta Johano Bosco (respektive Don Bosco). En la jaro 1883 pastro Johano Bosco en Italio havis sonĝon, ke inter la 15-a kaj 20-a paraleloj sude de la ekvatoro "naskiĝos nova riĉa civilizacio, kie fluos lakto kaj mielo".

Vizitante Brazilon, oni devas nepre plani viziton ne nur en la ĉefurbo, sed ankaŭ aŭ antaŭ ĉio en Bona Espero.

Bona Espero estas edeno sur la tero. Tiel mi ĉiam pensos pri tiu belega loko. Ĝi estas loko, kiu havas animon, kiu vivas kaj kiu estas plenplena de amo. Ĝi ŝanĝas nian pensmanieron, nian vidmanieron de la mondo, nin.



Adorejo

Fotoj: Ryszard Komarnicki:  
dum la 71-a IJK



Akvofalo

Pri Bona Espero oni povas legi artikolojn, librojn, rigardi fotojn aŭ spekti filmojn, sed tio estas nur anstataŭaĵo. Veran Bonan Esperon ĉiu sentos nur estante tie, surloke. Tiam oni spertas ion nekredeblan, neforgeseblan, neimageblan... Restado en Bona Espero konsciigas al ni potencon de naturo, sed ankaŭ fortegon de la homo.

Bona Espero situas en la centro de Brazilo, 250 km norde de la ĉefurbo, proksime de la urbo Alto Paraíso, proksime de la nacia parko Chapada dos Veadeiros (Altebenajo de Cervĉasistoj). Bona Espero okupas terenojn de savano. Ĝi estas savano malriĉa je kreskaĵoj. Ĝi abundas ĉefe je sekecaj herboj kun nemultaj arboj. Maldensa disloko de arboj estas rezulto de manko de akvo. Pluvas en la pluvsezono, do somere kaj vintre en la seka sezono estas daŭre sune kaj nokte malvarme. La mondo de bestoj de brazila savano ne estas tiel riĉa kiel en Afriko.

Malgraŭ tiel malfacilaj vivkondiĉoj Bona Espero estas oazo de verdaĵo kun du mil



La lago Paranoá





Antaŭ la malnova domo

Ekzemple el avokado? Apetitegal!

Ekzistas tiuj lokoj en la mondo, kiuj impresas nin per siaj antikvaĵoj, lukso kaj atrakcioj, kaj jenaj lokoj, kiel Bona Espero, kiuj miregigas per alia maniero. Ĉi tie estas vera internacia esperantista centro, memsufiĉa, realiganta socian laboron, plenumante gravan rolon utiligi loko kaj internacie Esperanton. Du idealistoj, en la kunlaboro de multaj aliaj esperantistoj, scipovis krei belan lokon sur la tero, en kiu regas

arboj, legom- kaj frukto-ĝardenoj kaj kun sep konstruaĵoj. La nunan bildon de Bona Espero ni ŝuldas al la esperantistoj Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia, kiuj rezignis sian komfortan vivon en Italio kaj venis al Bona Espero, por helpi realigi idealojn, kiujn ĉiuj homoj sentas en sia koro, sed plejofte ne kuraĝas realigi.

Kiam ili alvenis, surloke estis nur unu konstruaĵo, kiu postulis tujan riparon. Dum sia pli ol 40-jara volontula laboro tiuj du idealistoj kune kun volontuloj el la tuta mondo konstruis sekvaĵojn pli modernajn konstruaĵojn, edukis pli ol 800 infanojn, ne forgesante ankaŭ pri la ĉirkaŭa naturo. Tiamaniere Bona Espero fariĝis loko – farmbieno – kie oni produktas necesajn legomojn, kiuj garantias memsufiĉon al loĝantoj kaj alvenantaj gastoj. Mi estis surprizita, ekscianta, ke dum kultivado de legomoj kaj arbofruktoj ĉi tie oni ne uzas kemiaĵojn. Ĉiuj nutraĵoj estas preparitaj el freŝaj produktoj. Imagu do freŝan sukcon, kiun vi preparas ŝirkoлектante freŝajn pasifrukton, foliobrasikon, citronon aŭ petroselon. Vi kirlas ĉion, aldonante iom da akvo, kiu ĉi tie estas pura, elfonta. Aŭ ĉu vi imagas glaciaĵojn sen iu ajn kemiaĵo?

amo, solidareco, amikeco, justeco, etika kunlaboro. Alvenante al Bona Espero, mi ne imagis, kian grandegan laboron, amon kaj fidon devis Ursula kaj Giuseppe enmeti en tiun lokon, ke ĝi estu tia, kia ĝi estas hodiaŭ ... Dank' al tio Bona Espero konfirmas, ke ĉiu el ni povas esti tia, kia ŝi/li deziras esti, senkonsidere pri aĝo, edukiteco, deveno, socia statuso...

**La konkursa tasko** estas jena:

Respondu: Kio estas por vi amikeco?

La konkursan taskon bonvolu sendi kun via nomo, adreso kaj indiko "Konkurso – legendo" ĝis la 30-a de septembro 2016 al la adreso de Centrum Edukacji Międzykulturowej - Wrocław, ulica (strato) Legnicka 65, PL 54-206 Wrocław, Polska/Pollando.



Bona Espero

## La sorĉa kanto-mondo

La rubrikon preparas Małgosia Komarnicka,

ul. Kilińskiego 14/3, PL-59-300 Lubin, [malgosia.junaamiko@gmail.com](mailto:malgosia.junaamiko@gmail.com)



**Kanto akompanas nin ĉie...  
Ni volonte aŭskultas ĝin, ĉar ĝi  
helpas vidi kaj krei alimaniere  
la mondon, ebligas revii aŭ  
transdoni niajn sentojn.**

**Ĝ**i ankaŭ helpas akiri pli bonajn rezultojn dum lernado, ĉar lernantoj ludante samtempe lernas, kreskigas sian emocian engaĝiĝon en la lerno-procezo. Sufiĉas nur ekkanti, kaj ili tuj rememorigas kanto-vortojn. Tiamaniere la lernantoj plej bone kaj sugeste alproprigas al si la materialon de la leciono, ofte ne konsciante, ke ili ekzercas sin en fremda lingvo.


La laboro kun kanto havigas ĝojon kaj kontenton al la lernantoj; do ni ne malhelpu ĉi tiun agrablecon de kantado dum la Esperanto-lecionoj.

Mi proponas kune kanti la kanton Ludilo, kiun vi trovos en la libro *Nova aventuro* de Halina Kuropatnicka-Salamon. Halina Kuropatnicka-Salamon estas aŭtorino de la vortoj de la kanto. Nekonata tamen estas la aŭtoro de la popola muziko.

## Ludilo

*Ludilo tre grava  
estas pilko flava.  
Vespere, matene  
ĝi saltas serene.*

**Refreno:**  
*Lala lalala...*



*Vespere, matene  
ĝi saltas serene.  
Do mi kun rideto  
saltas kun pilketo.*

**Refreno:**  
*Lala lalala...*



## Ludilo

Valso

Popola melodio



La melodio estas aŭdebla ĉe: <https://www.youtube.com/watch?v=j9sOj2DVLt0>

**Kantu kaj lernu!** – Bonvolu sendi al mi viajn proponojn de viaj naciaj kantoj, por ke la legantoj de *Juna Amiko* havu eblecon ekkoni belajn kantojn el la tuta mondo.





Rubrikestro:  
Elena Nadikova,  
E-klubo "Betuleto"  
Lernejo/Ŝkola 56,  
pr. Traktorostroitej, 38  
RU-428028 Ĉeboksari, Rusio  
[lana\\_espero@mail.ru](mailto:lana_espero@mail.ru)



# Konferenco de ILEI

## Saluton, karaj legantoj!

Jam finiĝis somero kaj ni alktimiĝis dum tiu tempo legi pri diversaj internaciaj aranĝoj, kie esperantistoj denove lernis kaj spertis interkulturecon.

**T**iun-ĉi rubrikon ni dediĉas al la ĉefa jara kunveno de ILEI – Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. *Juna Amiko* estas revuo por komencantoj de tiu organizo. Kaj kie komenci sian esperantumadon? Ankaŭ en ILEI-konferenco, kompreneble!

Ĉi-jare ĝi okazis meze de Eŭropo – en Hungario, en la tre afabla urbo Nyiregyhaza. Ĝi situas en la plej orienta parto de la lando. Nyiregyhaza estas unu el la 7 plej grandaj urboj de Hungario. Ĝi estas konata unuavice kiel la fama kuracloko. Tie situas banejoj kun minerala saniga akvo.



La loko estis perfekte elektita ankaŭ rilate al la konferenc-kondiĉoj. Je dispono de la konferencanoj estis konstruaĵoj de Nyiregyhaza universitato – unu el la scio- kaj klerig-centroj en Hungario. Laŭ la programero oni povis esti aŭ en granda salono aŭ en malgranda klasĉambro. Ĉiuj ejoj estis bone ekipitaj per necesaj teknikaj kaj aliaj bezonaĵoj.

La ĉi-jaran ILEI-konferencon partoprenis 130 esperantistoj el 26 landoj de 5 kontinentoj.

La temo de la 49-a ILEI-konferenco estis "Novaj vojoj de lernado". Temis ne nur pri Esperanto-studado, sed ĝenerale pri la eduka procezo. La temo estis elektita ne hazarde. La moderna mondo tute ŝanĝis la nunan pedagogian situacion. Se antaŭe instruisto ĉiam superis la lernadon kaj la lernantojn, hodiaŭ iliaj roloj egaligis. Pere de modernaj teknikaj lerniloj la studentoj ofte facile memstare



studas diversajn fakojn. La sukceso de tiuj paĝaroj, ekzemple, por Esperanto – Duolingo aŭ Lernu.net – pruvas ŝanĝojn de la nuna edukado. Krome, graviĝis komunikado ene de la eduka procezo. Do, ILEI kiel organizo de instruantoj devas, kompreneble, konsideri tion. La temo de la 49-a ILEI-konferenco tute kongruis kun la flanke de UEA proklamita Jaro de la Lernanto – JdL. Ĝi estis lanĉita en Nitro (Slovakio) dum la 101-a Universala kongreso de Esperanto (UK) – kaj daŭros dum unu jaro ĝis la UK-2017 en Seulo (Koreio). Dum tiu jaro estas planataj diversaj aranĝoj, rilataj al la edukado. La 49-a ILEI-konferenco komencis realigadon de JdL laŭ la propra programo. Dum la konferenco en Nyiregyhaza okazis multaj tre altkvalitaj prelegoj, prezentoj, atelieroj. Oni povis diskuti pri diversaj aspektoj de la eduka procezo, pri rolo de Esperanto en interkultura lernado. La eminentaj prelegintoj prezentis riĉajn kolektojn de



instru- kaj kapablig-materialoj, proponis interesajn diversspecajn ekzercojn.

Ĝenerale la programo estis tre riĉa kaj densa, kiel kutime dum la ILEI-kunveno. Ĉiu partoprenanto povis elekti iun aŭ alian programeron laŭ propraj deziro kaj intereso. Diversaj aktivaĵoj plenigis la tutan semajnon. Altnivelajn prelegojn sekvis interesaj debatoj, seminarioj, diskutrondoj, cerbumado pri diversaj gravaj temoj. Ĉiu povis proponi proprajn ideojn, vidpunktojn, sciojn por la komuna pripensado kaj pritraktado. Tiuj opinioj tre gravas por ILEI, ĉar ili donas novajn stimulojn kaj agadirektojn por la ligo pri instruado kaj kapabligo rilate al Esperanto.

Kompreneble, nepris diversnivelaĵoj kursoj pri Esperanto, gviditaj de spertaj kaj lertaj instruistoj. Ilin partoprenis pli ol 60 konferencanoj, inter ili pli ol 20 novuloj. Fine de la kursaro okazis ILEI-ekzameno por la partoprenintoj. 25 el ili sukcese trapasis la ekzamenon kaj dum la fermo en solena etoso ricevis siajn diplomojn. Krome, atestilojn ricevis 11 komencantoj, kiuj diligente lernis Esperanton.

Dum la konferenco la partoprenantoj ne nur havis la eblecon viziti diversajn kursojn/seminariojn, sed povis studi aŭ perfektigi siajn instru-kapablojn. Okazis kelkaj sukcesaj prelegoj kaj trejnadoj pri tio, gviditaj de profesiaj spertuloj (Zsófia Kóródy, Mireille Grosjean, Duncan





Charters kaj aliaj). Ilin partoprenis multaj instruistoj el diversaj mondanguloj. 25 el ili ankaŭ ricevis diplomojn pri instruista trejnado, 5 konferencanoj spertigis sin en provlecionoj. Krome, tre valoris, sendube, interŝanĝo de instru-spertoj, kio okazis konstante dum la diversaj programeroj.

Kaj, kompreneble, la konferencanoj malkovris por si mem Hungaron – ĝiajn kulturon, tradiciojn, vivon. Dum la konferenco okazis belegaj koncertoj de la lokaj artistoj kaj grupoj. Ekzemple, per siaj kantoj ĝojigis la partoprenantojn Attila Schimmer – la fama hungara kantisto. Gajajn hungarajn dancojn, inkluzive, kompreneble, la faman ĉardaŝon, prezentis lokaj folkloraj grupoj. Nacia vespero restis en la memoro de la konferencanoj kiel la plej signifa impresio ene de la kultura programo. Ne mankis ekskursoj. La partoprenantoj ne nur konatiĝis kun Nyiregyhaza mem, sed kun ĝia bela kaj fama ĉirkaŭaĵo. Dum la tuttagaj ekskursoj la konferencanoj gustumis lokajn trinkaĵojn kaj eĉ mem produktis ĉokoladon.

La konferencanoj demonstris ankaŭ siajn kapablojn – dum la internacia vespero. Sonis kantoj en diversaj lingvoj, muziko el diversaj mondopartoj, la partoprenantoj ĝuis belegajn naciajn dancojn. Dum unu vespero koreoj plezurigis la konferencanojn per siaj dancoj, muziko, prezentoj. Ja Koreio gastigos la ILEI-kunvenon venontjare. Danke al tiu prezento la ĉi-jaraj konferencanoj jam povis imagi la etoson de la ILEI-Kongreso en Koreio.

Tradicie okazis Lingva Festivalo. Por ĝi oni elektis etnografian subĉielan muzeon Sóstó. Kaj scivolemuloj povis lerni kaj ekzerciĝi en la hungara lingvo, kiu estas unu el la plej malfacilaj lingvoj en la mondo. Sed ja esperantistoj alkitimiĝis superi lingvajn barilojn, ĉu ne?

Dum ripoztempo, kiu fakte ne multis, la partoprenantoj havis ankaŭ la eblon iom sanigi sin en diversaj banejoj kun minerala akvo. La organizantoj zorgis pri rabatoj por la konferencanoj, kio estis aparte tre agrabla. Do, Esperanto protektas ne nur pacon kaj interkomprenon, sed ankaŭ la sanon – morale kaj fizike, ĉu ne?

Fine de la konferenco okazis enketo pri ĝiaj rezultoj. La partoprenantoj skribis siajn impresojn, rimarkojn, sugestojn, venintajn de siaj observoj kaj spertoj dum tiu ĉi aranĝo. Tiuj resonoj, sendube, estas ege valoraj por la sekvontaj jarkunvenoj de ILEI! Ja reago de membroj estas la unua instigo por la Ligo kaj ĝia Estraro. ILEI planas daŭrigi tiun novan iniciaton pri enketado por pli bona realigado de siaj ĉefaj celoj kaj taskoj.

La konferenco finiĝis per preskaŭ 3-taga densa kaj fruktodona Estrarkunsido de ILEI, kie oni konkludis la rezultojn de la ĉi-jara kunveno kaj planis sian laboron por la sekvonta tempo.

La ĉi-jara konferenco estis la lasta, ĉar dum la komitat-kunsido de ILEI en Nyireghaza oni decidis nomŝanĝi venontajn jarkunvenojn al kongresoj de ILEI. Tiu nomo pli kongruas pro abundeco kaj varieco de la programo. La sekva ILEI-jam-kongreso okazos en Koreio – lando de UK-2017, en la marborda urbo Busan, la 15-22-an de julio 2017 (rigardu la paĝaron de ILEI <http://www.ilei.info/> aŭ la facebook-grupon <https://www.facebook.com/groups/158807324552503/?fref=ts>). Do, karaj JA-anoj, se vi kontentiĝis, legante tiun ĉi materialon pri la ĉefa jara ILEI-kunveno, bonvenon al Koreio! Ni denove ĝuos la veran interkulturan etoson danke al nia internacia lingvo Esperanto!

**Elena Nadikova**  
estrarano de ILEI

Eteka Kami Laifo Innocent

## En la norda parto de Benino

**Jen Innocent Laifo Kami Eteka, juna studento pri informatiko en granda urbo Abomey-Calavi en la suda parto de Benino; sur la foto li staras apud tipe vilaĝa dometo afrikstila de la Nordo.**



Tia domo estas domo, kiu apartenas al la etno “Peul” aŭ “Gando”. Oni vidas tiujn etnojn en la norda parto de Benino. Viroj kreunaj virinoj vivas en tiaj domoj kun siaj infanoj. Tiuj homoj estas la plej malriĉaj. Tiu domo situas en la departemento Alibori, la komunumo de Gogonou, en la vilaĝo, kiu nomiĝas Cinancérou. La loĝantoj de tiu vilaĝo estas



“Peul”. De tiuj etnoj venas infanoj “Talibé”. La infanoj Talibé estas infanoj, kiuj petas manĝon sur la vojoj, en la manĝvendejoj ĉiun tagon, kaj vespere iras hejmen por lerni el la Korano.

Mi neniam vivas en tia domo. Ĉirkaŭ tiu domo estas kampoj. La kamparanoj kreskigas maizon, milion kaj sorgon. Ili bredas

bovojn, kaprojn, ŝafojn, kokojn ktp. En tia domo estas nek televidilo nek elektro. Mi estis en tiu vilaĝo la 20-an de januaro 2016 por eduki gepatrojn de tiaj infanoj registri ilin en la lernejo. Mi estis sendita en la vilaĝon de neregistara organizo (NRO), dediĉita al la eduko de orfoj, de forlasitaj infanoj.

La nomo de tiu NRO aludas al jena saĝa frazo: “Laboro estas trezoro”.

Mi vidis virinojn, kiuj lavis siajn vestojn apud la rivero. Mi intencas iri tien de tempo al tempo. Mi sentas min feliĉa en tiu vilaĝo. La vilaĝo estas sen bruo.



Luiza Carol

# Sorina el nuboj

**Foje, knabino ankoraŭ nenaskita promenis en la ĉielo, por esplori la mondon de sia onta vivo. Neniu homo sur la tero kapablis vidi la ontan knabinon, kiun akompanis malgranda blanka nubo. La kunvojaĝanta duopo estis soranta tage kaj nokte super montoj, maroj, lagoj, riveroj, arbaroj, dezertoj, urboj, vilaĝoj...**

**D**ume, la nubo flustradis ĉe la oreloj de la onta knabino ĉiujn aferojn, kiujn tiu bezonis koni, por ke ŝi povu orientiĝi en sia onta vivo. La nubo havis mildan mallaŭtan voĉon kaj serenajn blujajn okulojn. La onta knabino rigardis scivole la pejzaĝojn, aŭskultis la vortojn de la nubo kaj tuj komprenis ĉion tutece, ĉar ontaj infanoj kapablas pensi multe pli rapide kaj profunde ol la plej saĝaj el la vivantaj homoj.

Foje, ili renkontis gajan neĝhomon, kiun la onta knabino tuj ekamis. Sed la vetero varmiĝis, la neĝhomo komencis fandiĝi kaj malgajiĝi. La bluokula nubo tenere brakumis ĝin, ĝis la neĝhomo ennubiĝis kaj eksoris ĝoje en la ĉielo, nevidata de homaj okuloj. Baldaŭ la neĝhomo dankis kaj ridetis, adiaŭis la kunvojaĝantojn kaj forisoris rapide.

Alifoje, la onta knabino rimarkis kelkajn delikatajn galantojn, kiujn baldaŭ la suno ekvelkigis. La nubo brakumis ilin, ĝis ankaŭ ili adiaŭis gaje kaj forisoris tute nevidataj de homoj.

La samo okazis kun forhakita abio kaj kun kapreolido falinta en abismon. Unu post la alia ili dankis kaj malproksimiĝis



ien en la profundon de la ĉielo. Kaj kiam du sonoriletoj falintaj sur ŝoseon estis dispremitaj de kamiono, la onta knabino eĉ ne miris, aŭdante baldaŭ iliajn gajajn tintadojn en la senlima ĉielbluo.

Fin-fine venis la tempo, ke ŝi esploru ankaŭ la homan vivon de pli proksime. Por tio ili rigardis tra fenestroj de grandaj kaj malgrandaj konstruaĵoj, ĉu malriĉaj ĉu luksaj, tra fenestroj de lernejoj, muzeoj, vendejoj, hospitaloj... La nubo vidigis al la onta knabino kaj la ĝojojn kaj la suferojn de la vivo.

Foje, ili vizitis bruantan urbon, kie senhejmaj malsanaj infanoj suferadis pro malsato kaj malvarmo. Apud ili, riĉaj infanoj trodikiĝis kaj malsaniĝis pro tro multa manĝaĵo. La onta knabino ektemis pro indigno kaj diris:

“Mi ne plu volas naskiĝi.”

Sed la saĝa nubo kuraĝigis ŝin:

“Karulino, ne primum la vivon. Pensu, kiom da helpo tiuj infanoj kaj ties gepatroj bezonas. Post kiam vi naskiĝos, vi ja

kapablos plibonigi vian propran vivon kaj ankaŭ la vivojn de aliuloj. Tio estos granda defio por vi kaj ankaŭ bonŝanco...”

Kaj la nubo kondukis ŝin al modesta vilaĝo en alta montaro. Tie aŭdiĝis granda ĥoro, en kiu ĉiuj vilaĝanoj partoprenis. Kunkantis infanoj kaj plenkreskuloj, sanuloj kaj malsanuloj, maljunuloj en rulseĝoj, blinduloj... – ankaŭ la beboj klakfrapis la manojn kaj ĝuis la okazaĵon. La vilaĝanoj estis kunfestantaj tradician printempan feston, kaj iliaj koroj batis kune tiom forte, ke la onta knabino sentis la ritmon de ilia vivoĝojo kaj la varmon de ilia amikeco.

“Mi ja volas naskiĝi” – ŝi diris.

Kiam la taŭga momento venis, la nubo montris al la onta knabino aviadilon kaj diris:

“Nun ni alkroĉiĝos al la fronta fenestro kaj rigardos internen”.

Tra la fenestro videblis du junaj gepilotoj.

“Jen viaj ontaj gepatroj” – diris la nubo.

La onta knabino tutkore ŝatis siajn ontajn gepatrojn. Sed tiuj povis nek vidi nek aŭdi ŝin. Ankaŭ la blankan nubon bluokulan ili ne povis aŭdi, sed tiun ili ja povis vidi, kaj longtempe iliaj okuloj direktiĝis al ĝi. Kaj tie, ekster la fenestro de la aviadilo kaj ekster la oreloj de la ontaj gepatroj, la nubo kaj la onta knabino interparolis:

“Baldaŭ ni separiĝos, karulino, ĉar vi devos naskiĝi.”

“Ĉu vi ne plu akompanos min post mia naskiĝo, bona nubo?”

“Mi estos ĉiam proksime, sed vi ne plu aŭdos min. Mi tamen klopodos igi vin senti mian ĉeeston.

Post kiam vi elnubiĝos, vi baldaŭ forgesos pri mi. Nur malofte nia kunvojaĝo nebule revenos en vian memoron. Dependos de vi, ĉu vi kapablos bone profiti pri tiuj raraj momentoj...”

\*\*\*\*\*

Sorina estis la filino de du junaj gepilotoj. Ŝiaj gepatroj kune stiradis aviadilojn kaj

ofte devis forlasi la domon por longa tempo. Kiam ili laboris, Sorina restis kun siaj geavoj, kiuj amegis ŝin. Somere, kiam la gepatroj feris, ili prenis ŝin per aviadilo en belajn lokojn, kie videblis montoj, arbaroj, lagoj, riveroj, marbordo...

Foje, la gepatroj de Sorina rakontis al ŝi, kiel ili elektis ŝian nomon. Ŝajnas, ke foje ili estis tre lacaj post longa malfacila pilotado, kiam ili iris ripozi kune. Ili ekdormis kaj havis la saman sonĝon! En tiu sonĝo ili vidis knabinon sorantan en la ĉielo, akompanata de malgranda blanka nubo. La knabino ridetis kaj malaperis. Post kelkaj monatoj ilia unua infano naskiĝis. Tiu estis knabino kaj ili nomis ŝin Sorina.

Tiu rakonto forte impresis la knabinon. Ŝi ofte rigardis la ĉielon kaj imagis al si, ke ŝi estas soranta... Ŝi ofte desegnis sin soranta kune kun nuboj super belaj pejzaĝoj...

La jaroj pasis rapide kaj glate, ĝis Sorina fariĝis dek-jaraĝa. Tiam ŝi subite malsaniĝis kaj oni enhospitaligis ŝin. La kuracistoj kaj la flegistoj faris ĉion eblan por helpi ŝin. Malgraŭ tio, la knabino havis tiom fortajn dolorojn en la gorgo, ke ŝi supozis, ke ŝi ne plu povus elteni tion. Ŝia febro altiĝis kaj la doloroj fariĝis eĉ pli aĉaj... kaj eĉ pli... Sorina ne plu havis forton por kribi aŭ plori.

Kaj jen subite la doloroj mildiĝis. Kvazaŭ malvarmeta kareso atingis ŝin. Ŝi malfermis iomete la palpebrojn kaj vidis apud si la blankan nubon.

“Saluton!” – ŝi diris al sia malnova amiko, kvazaŭ ili separiĝis antaŭ nur kelkaj horoj. “Ĉu mi ennubiĝis?”

“Nur portempe” – respondis la nubo. “Vi estas tre bonŝanca. Vi revenos hejmen sen doloroj. Kaj ĉi-foje vi rememoros ĉion...”

Sorina sentis sin malpeza kaj sana. Silente ili eksoris kune super la hospitalo kaj super la urbo. Estis aŭtune kaj agrabla venteto portis orkolorajn foliojn kaj bonodorajn petalojn de lila lilako. La ĉielo lilcoloriĝis pro la sunsubiro. Sorina sentis sin travidebla



kaj trapasita de milda malvarmeta lila lumo. Ankaŭ la nubo ekhavis lilajn nuancojn. Aroj de alaŭdoj trapasis ilin gaje.

Sorina sentis nepriskribeblan senton de feliĉo kaj amon por ĉiuj kaj ĉio. Senlima kiel la ĉielo estis tiu subita feliĉo, fakte ĝi fariĝis la ĉielo mem, kiun trapasis nun la aera knabino. Kaj en tiu transvorta feliĉo, ŝi subite aŭdis la ampensojn de ŝiaj gepatroj rilate al ŝi kaj iliajn preĝojn por ŝi. Ŝi aŭdis ankaŭ la geavojn, ŝian amatan instruistino kaj ŝiajn plej bonajn geamikojn pensantajn pri ŝi kun amo kaj tutkore dezirantajn ŝian resaniĝon...

“Mi volas reveni al ili. Mi volas brakumi ilin...” – ŝi diris.

\*\*\*\*\*

Sorina vekiĝis en blanka hospitala lito. Ŝi ne plu sentis dolorojn, sed estis ege laca kaj soifa. La kuracisto rigardis ŝin atente, kaj en liaj okuloj ŝi iel sentis ĉion de tiu feliĉo, kiun ŝi ĵus spertis. Tiam ŝi komprenis, ke tiun ĉielan soradon ŝi ĉiam rememoros. Ŝi respondis al kelkaj demandoj de la kuracisto. Ŝia voĉo estis malforta pro laco, sed la gorgo ne doloris, kiam ŝi parolis. Ŝi trinkis glason da akvo, mirante, ke simpla akvo povas ŝajni tiom bongusta, kiam la gorgo ne plu doloras. Apud la kusenon ŝi trovis sian malnovan pluŝ-ursidon. Ŝi komprenis, ke la gepatroj alportis ĝin tien. Oni tuj venigis ilin en la ĉambron, kaj imagu al vi, kiom ili ĝojis triope.

Sed la kuracistoj ne permesis, ke Sorina revenu hejmen tuj. Ili diris, ke ŝi devas ripozi kelkajn tagojn en la hospitalo, engluti pilolojn kaj manĝi ĉion, kion oni donos al ŝi.

La knabino estis tre laca kaj ekdormis. Ŝi sonĝis, ke ŝi soras super bonodora lilako. En la sonĝo la blanka nubo rigardis ŝin ame. La lilaka odoro fariĝis pli kaj pli forta kaj... ŝi vekiĝis. Apud ŝia lito troviĝis glaso kun malgranda branĉo de lila lilako. Ridetanta

junulino estis rigardanta ŝin per serenaj bluaj okuloj. Ŝi portis neĝblankan robon.

“Bonan tagon, Sorina! Mi estas Kora. Jen, mi alportis al vi libron kun belegaj fotoj...”

Kora estis dietisto. Ŝi venis por konsili al la knabino kiel nutri sin, por ke ŝi fariĝu forta kaj energiplena. La libro, kiun ŝi alportis enhavis fotojn pri fruktoj, legomoj, nuksoj, semoj, cerealoj, fungoj... Ĝi ankaŭ enhavis tre facilajn receptojn pri bongustaj salatoj, supoj, kaĉoj kaj kukoj. En la ĉapitro pri herboteoj videblis fotoj pri folioj, floroj, semoj kaj radikoj. Sorina estis ravita pri la bela libro. Kora diris, ke ŝi povas eklegi ĝin kaj poste preni ĝin hejmen.

Tiutage ili babilis longe kaj ekamikiĝis. Kora rakontis al ŝi interalie, ke en la mondo ekzistas multaj infanoj, kiuj suferegas pro malsato kaj manko de pura akvo.

“Tion mi scias” – diris Sorina, iom mirante pri sia subita rememoro.

Kora daŭrigis: “Nun la sciencistoj klopodas trovi novajn manierojn por adapti sanigajn fruktojn kaj legomojn al malmildaj klimatoj, por plibonigi la klimatajn kondiĉojn kaj la grundojn, por kreskigi sanigajn bongustajn algojn en oceanoj kaj maroj...”

Sorina atente aŭskultis ĉion, kaj en ŝian menson alvenis nova penso. Ŝi diris:

“Ankaŭ mi volas labori tiudirekten, kiam miaj lernojaroj finiĝos. Mi volas kontribui al tiuj projektoj, por ke ĉiuj infanoj povu nutri sin per sanigaj bongustaj manĝaĵoj kaj trinki puran akvon.”

Korina ekĝojis:

“Bonega ideo! Pormomente indas legi atente la libron, kiun mi donis al vi. Ju pli vi lernos pri sanigaj vivkutimoj, des pli vi povos plibonigi vian vivon kaj eventuale helpi aliulojn.”

La okuloj de Sorina direktiĝis al la fenestro. De ekstere, blanka nubo estis rigardanta ilin.

Luiza Carol

# La knabino el la montaro

**Pri la volumoj “La migro- kaj lernojaroj de Heidi” kaj “Heidi povas apliki, kion ŝi lernis” de Johanna Spyri, elgermanigitaj de Dietrich Michael Weidmann, 2016, Uster, Svislando.**

Tiu ĉi recenzo rilatas al la du libroj pri Heidi, la knabino el la Svisa Alpa montaro. Eble vi jam ekkonis la amindan knabinon Heidi, ĉu legante tiujn famajn librojn en via denaska lingvo, ĉu spektante filmon aŭ teatran spektaklon aŭ televid-serion pri ŝi. Tiukaze vi verŝajne ĝojos rerenkonti ŝin en bela Esperanta traduko. Se vi ankoraŭ ne konatiĝis kun Heidi, vi espereble havos tre agrablan surprizon ekkoni tiom mirindan infanon, samkiel mi mem havis neforgeseblan ĝojon, legante la unuan fojon tiujn librojn antaŭ kelkaj jardekoj. Mi konsilas vin komenci la legadon de la volumo “La migro- kaj lernojaroj de Heidi” kaj daŭrigi kun la sekva volumo, “Heidi povas apliki, kion ŝi lernis”.

Heidi estas mirinde bonkora infano,



kiun ĉiuj ekamas, ĉar ŝi estas adaptiĝema, helpema kaj ĝojema. Ŝi devas travivi spertojn, kiuj aliajn infanojn eble timigus, sed ŝi estas tiom saĝa, ke ŝi sukcesas adaptiĝi al cirkonstancoj, plibonigi kelkajn cirkonstancojn kaj eĉ plibonigi la vivojn de tiuj ĉirkaŭantaj ŝin, ĉu infanoj ĉu plenkreskuloj. Kvankam Heidi estas orfa kaj en la komenco ne sufiĉe zorgata de siaj parencoj, je la fino de la romano ŝia avo amegas ŝin, kaj krome ŝi jam havas multajn verajn geamikojn.

Mi preparis por vi etan demandaron. Mi elektis tri el la malfacilaj aŭ malkutimaj situacioj, kiujn Heidi devas alfronti en la romano. Mi lasos al vi tempon pripensi kion vi farus en similaj situacioj. Eble estus bone eĉ surpaperigi

viajn respondojn, por ke vi povu kompari ilin poste kun la reagoj de Heidi.

Tiujn reagojn mi malkaŝos al vi sur alia paĝo.

**Jen la demandoj:**

1. Imagu, ke vi devas subite transloĝiĝi en kabanon, ĉe stranga

malgastema parenco, kiun vi tute ne konas. Tie vi trovas nek liton, nek littukojn, nek kusenon. Kiel vi reaguas?

2. Imagu, ke vi atendas la viziton de via plej bona amikino, kiun vi longtempe ne povis renkonti. Ĝuste kiam ŝi devas alveni kune kun sia familio, aperas la kuracisto de tiu familio, por anonci malgaje ke la atenditoj devis prokrasti sian viziton. Vi rememoras tiun kuraciston, ĉar li foje helpis vin ame kaj kompetente. Vi rimarkas, ke li estas profunde malgaja. Kiel vi reaguas?





3. Imagu, ke vi faris tre bonan agon, pro kio iu riĉa sinjorino estas dankega al vi. Ŝi volas rekompenci vin, kaj demandas vin, kion vi deziras. Kiel vi reagus?

**Jen la respondoj** (sed unue provu mem!):

1. Heidi trovas etan subtegmentan fojnejon, kie ŝi ĝoje admiras la ĉielon videblan tra truo. Ŝi rapide trovas rimedojn por prepari tie bonodoran kuŝejon el fojno. Ŝia avo donas al ŝi dikan sakon, kiun ŝi uzas kiel kovrilon. Tiel ŝi enlitiĝas tre kontenta.

2. Kvankam ricevanta malagrablan ŝokon, Heidi estas sufiĉe sentema por rimarki kaŝitan, nekutime profundan malgajecon en la okuloj de la kuracisto. La kaŭzo de tiu malgajeco estas la fakto, ke la bona kuracisto ĵus vidviĝis. Sed Heidi ne scias tion. Ŝi supozas, ke la sola kialo de la malfeliĉa mieno de la kuracisto estas ties embarasa tasko anonci la bedaŭrindan prokraston de la vizito. La knabino kompatas la kuraciston kaj klopodas konsoli lin. Ŝia menso serĉas kialojn por ne troigi la malagrablaĵon, eĉ por bagateligi ĝin. Jen la fragmento:

“Heidi tiom deziris regajigi la sinjoron Doktoron, ke ŝi rekomencis konvinki lin, ke daŭros tiom mallonge sur la alpopaŝtejo, ĝis revenos la longaj, varmaj somertagoj, ke oni tion apenaŭ rimarkos, kaj dum tio Heidi mem tiel konvinkigis pri sia konsolo, ke ŝi

alvokis supre al la avo tute gaje: ‘Ili ankoraŭ ne ĉeestas, sed ne daŭros longe, ĝis ankaŭ ili venos.’”

3. Heidi petas la bonan sinjorinon donaci bonan liton kune kun kusenoj kaj kovriloj al blinda malsana maljunulino, loĝanta apude. Indas menci, ke Heidi jam estis ricevinta bonan liton kiel donacon, dum la maljunulino malfacile eltenus la vintron en la montaro, sen sufiĉe bonaj matraco, kovriloj kaj kusenoj.

En miaj adoleskaj jaroj mi tiom ekscitiĝis pri tiu mirinda knabino de la montaro, ke mi tuj komencis imiti ŝin, tute nature. Fojfoje miaj streboj imiti ŝian karakteron pli-malpli sukcesis. Sed kutime la reagoj de la infanoj kaj plenkreskuloj ĉirkaŭ mi ne estis tiom pozitivaj kiel en la romano. La influo, kiun Heidi havis super min, estis tiom granda, ke eĉ nun mi verŝajne imitas ŝin kelkfoje, senkonscie. Bonkoreco, optimismo kaj gajeco estas bonaj sanigaj trajtoj en ĉiuj etapoj de la vivo. Sed, se vi inklinos imiti ŝin, samkiel mi faris kaj eble daŭre faras... – ne supozu, ke vi ŝanĝos tiom facile la tutan mondon ĉirkaŭe... Indas pensi, ke unue por vi mem estas bone kaj ĝojige trovi la bonajn flankojn de ĉiuj situacioj kaj de ĉiuj homoj, ame helpi viajn konatulojn laŭ viaj kapabloj kaj tutkore ĝui la belecon de la naturo, samkiel Heidi kutimis fari. Poste, kiu scias, eble ankaŭ aliaj imitoj vin...



Hori Yasuo

## Enigmo pri Japanio

Unu paro sidas kaj ĝoje babilas.  
Kion ili faras?



Tiu ĉi estas kafejo. Dekstre en la ĝardeno estas japanstilaj ombreloj kaj maldekstre pendas belaj ŝtofoj. Sur la tablo troviĝas kuveto. Certe en ĝi estas du tasoj da




kafo. Sub la tablo estas blanka akvo. Kio ĝi estas? Por kio estas akvo en la kafejo? Ĉu vi jam komprenis, kion la paro faras?

Ili varmigas siajn piedojn per varma akvo el varma fonto. Homo starante vivas, kaj do la piedoj estas ĉiam pli mal-varmaj ol la kapo. Kiam oni varmigas siajn piedojn, la sango bone cirkulas supren kaj sanigas la korpon. En multaj turismaj lokoj oni povas trovi “varman akvon por piedoj”, “ashiyu”, ĉar Japanio estas vulkana lando, kaj do ĉie fontas varma akvo.

Piedo = ashi = per hiragana: あし  
Bano = yu = per hiragana: ゆ

**Solve de la krucenigmo el la antaŭa numero: →**

**Solve de la alumet-enigmo el la paĝo 13: ↓**



|   | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|----|
| A | L | I | B | E | R | E | C | O |   |    |
| B | T | E | R | E | N | A | T | I | M | A  |
| C | A | T | A | K | O | P | E | R | O | N  |
| Ĉ | G | E | N | O | B | O | R | I | L | A  |
| D | O | R | O | F | A | L | O | N | U | L  |
| E | J | O | P | E | N | O | R | A | N | O  |
| F | A | M | E | R | I | K | A | N | O | J  |
| G | D | O | K | K | A | T | O | P | E |    |
| Ĝ | O | D | O | M | U | S | O | B | A | T  |
| H | R | O | S | A | L | O | K | O | L | O  |
| Ĥ | U | S | O | N | O | S | O | N | A | S  |
| I | S | E | L | O | I | D | U | R | E | C  |
| J | S | E | K | U | R | E | C | O |   |    |



# Lernanto – en la centro de la atento

La rubrikon  
prizorgas:  
Stefan MacGill



**Kiel vi fartas kiel lernanto?**

**Ĉu vi ĝuas vian tempon en via lernejo? Se jes, kial? Se ne, kial ne? Kiujn partojn vi ĝuas?**


**Kiujn aspektojn vi ne ĝuas?**

**S**e vi jam ne plu estas lerneano, respondu la demandojn pri via tempo en lernejo. Kompreneble, lernado ne ĉesas, ekde kiam vi ne plu vizitas lernejojn. Iel, oni plue lernas tra la tuta vivo – eĉ se nur reage al spertoj kaj malsukcesoj.

Tradicie, edukado estis instruisto-centra. Tio daŭras multloke, sed pli kaj pli la emfazo transiras al la bezonoj kaj deziroj de lernantoj. La kreskanta rolo de komputiloj malfermas multajn novajn eblojn por lernado – ofte per forumoj unu ret-vizitanto povas helpi aliajn.

Jen kelkaj el la temoj de la Jaro de la Lernanto, proklamita de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj realigata kunlabore kun ILEI. Ĝi ekis en la Universala Kongreso (UK) en Nitro, Slovakio, kaj venos al la fino en Seulo, Koreio, en julio 2017. Ene de tiu jaro okazos ĉ. 14 eventoj en ĉiuj kontinentoj – kun sugestoj al lokaj societoj kaj Landaj Asocioj de UEA kiel aranĝi proprajn eventojn aŭ aliajn aktivaĵojn. Tri gravaj artikoloj prezentas la Jaron kaj la kalendaron de eventoj en la juli-aŭgusta numero de la revuo *Esperanto*. Same faras la retejoj de ILEI ([ilei.info](http://ilei.info)) kaj la nova retejo de UEA: *Aktivulo.net*.

Ĝuu la krucenigmon kaj per ĝi lernu kelkajn novajn vortojn pri edukado kaj lernado!



## Jaro de la Lernanto

(R) uzu la radikojn (sen finaĵo)

### Horizontale →

2. Eterna varbslogano de esperantistoj: “\_\_\_\_\_ al la kurso!” (5)
6. Loko en Kroatio kun multaj akvofaloj. Ĉu vi dormis tra lecionoj de geografio?
9. Studarangō – ili figuras multe en la programo de UEA pri Aktivula Maturigo (AMO). (9)
11. La tenilo por la korpoparto, kie okazas lernado. (R 5)
12. Vasta kredo: “Per edukado, ĉio estas \_\_\_\_\_.” (4)
13. Verda legomo uzata en salato. Ĉu vi dormis tra lecionoj de biologio? (7)
15. Valora metal’ (R 2)
16. Ujo, kiun portas instruisto aŭ studento por teni lernilojn. (R 3)
17. De kie lernanto tiras siajn hejmtaskojn (se ne manĝis ilin la hundo). (2-4)
19. Se via ekzameno ne sukcesas, vi ofte

- havas eblon provi ĝin en dua \_\_\_\_\_. (4)
20. Mallongigo por iu verko de la nuna krucenigma kreinto – pri brua vekilo. (2)
21. Intelektala diskutpunkto: “Kio venis unue, la kokino aŭ la \_\_\_\_o?” (2)
22. Akademia aŭ scienca kunveno; okazis regule en konferencoj de ILEI (R 7)
27. Praepokaj skribsistemoj uzitaj en pluraj landoj. (R 3)
29. Scienca, matematika aŭ alia diagramo aŭ bildo por ilustraci akademian dokumenton. (R 6)
30. Nuntempe instruado temas pli pri lern\_\_\_\_o – stimula al lernantoj mem studi kaj esplori. (2)
31. Granda prabest’ simila al bovino aŭ bizono. Ĉu vi dormis tra lecionoj de zoologio? (R 2)
33. Supernivelaj studentoj devas fari longajn, malfacilajn verkojn. (6)
35. Sepjara infano ne estas sufiĉe \_\_\_\_\_ por studi geometrion aŭ trigonometriion. (6)
37. Signifa tempoperiodo. “Ni nun trovas ĝin en la informadika \_\_\_\_\_.” (5)
38. Frakcion. Parteton de la tuto. Ĉu vi dormis tra lecionoj de matematiko? (4)
39. Scienca aŭ matematika ideo, kiu estas ankoraŭ ne pruvita. (6)
40. Orgojla sciencisto: “Mia inventaĵo \_\_\_\_\_ la tutan koncepton pri mia scienca branĉo!” (7)
42. Tradicia japana formo de teatro. Ĉu vi dormis tra lecionoj de kulturo? (2 R)
43. Por esti sukcesa studento, vi devas esti plena je \_\_\_\_\_. Viaj malfacilaĵoj plenskribi la nunan enigmon atestas je tio! (7)

### Vertikale ↓

1. Kion faras tradiciaj poetoj daŭre. Ili volas naski simlasonajn vortparojn. Ili celas al \_\_\_\_\_. (5-3 R)
2. Religio, kiu rezignas pri komforta vivo eble strebas eduki sin. (6)
3. Loko, kie oni tradicie instruas kaj homoj studas (7).

4. Du pronomoj – la unua por objekto, la dua pri grupo, kiu inkluzivas la parolanton (2-2)
5. Edukejoj por akiri super-nivelajn sciojn, la pinton de intelekta studado. (13)
6. Eduka strebo: “Kiu \_\_\_\_\_ la venontan mondiskuan ideon aŭ produkton?” (5)
7. Bero (R 3)
8. Akademia studsesio kun multaj kontribuantoj. Okazos tiu en Timisoara, Rumanio, en novembro.
10. Tipa ĉefa studa periodo, kiu entenas fakte 9 ĝis 10 monatojn da studado. (4)
14. Sufikso, kiu montras instrumenton. Ĉu vi dormis tra la Esperanto-kurso? (2)
18. La esenco de studado estas la \_\_\_\_\_o de informoj kaj ideoj. (2-7)
19. Intelektajn diskutojn, kie multaj personoj povas doni siajn vidpunktojn. Devenas el romia koncepto. (7)
23. Sprone al agado – eventuale rilata al lernado. (3)
24. Valora loko por lerni pri la pasinteco. (5)
25. Metala elemento kun la atoma numero 30. Ĉu vi dormis tra lecionoj de kemio?
26. Se la lernemulo estas analfabeto, necesas leg\_\_\_\_i librojn por tiu persono.
28. La antaŭlasta tradicia planedo, nun ke Pluto ne pli estas konsiderata planedo. Ĉu vi dormis tra lecionoj de astronomio?
32. En tradicia edukado necesas multe \_\_\_\_\_ la lernantojn. (4)
34. Junulara Organizo Internacia (mallongigo 3)
36. Prononco de la mallongigo por amaskomunikilo, kiu iom kontribuas al lernado, sed kiu multe malhelpas al la lerna procezo. (4)
40. Verko, kiun lernantoj regule devas pretigi pri difinita temo (3 R)
42. En sekse miksitaj lernejoj, \_\_\_\_\_ lernantoj lernas kune en la samaj klasĉambroj (2)





## Landaj Reprezentantoj – Perantoj de Juna Amiko

**Argentino:** [info@esperantoargentina.org](mailto:info@esperantoargentina.org). **Aŭstralio:** Aŭstralia Esperanto-Asocio, G.P.O. Box 2122 Melbourne 3001, Australia; [info@esperanto.org.au](mailto:info@esperanto.org.au). **Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg, Austria; [aon.913548977@aon.at](mailto:aon.913548977@aon.at). **Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgium; [financoj@fel.esperanto.be](mailto:financoj@fel.esperanto.be). **Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Bl. P 36, Ed. Venâncio III, sala 303, BR 70393-902 Brasília-DF, Brazil; [belabutiko@esperanto.org.br](mailto:belabutiko@esperanto.org.br). **Britio:** Esperanto Association of Britain, Esperanto House, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE, United Kingdom; [eab@esperanto.org.uk](mailto:eab@esperanto.org.uk). **Bulgario:** Mariana P. Evlogieva, PK 973, BG-1000 Sofia, Bulgaria; [mrvp@interpres.org](mailto:mrvp@interpres.org). **Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady II, Czech Republic; [cea.polnický@quick.cz](mailto:cea.polnický@quick.cz). **Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231 Curico, Chile. **Ĉinio:** Gong Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, Nanchang, CN-330031, China; [arko.gong@qq.com](mailto:arko.gong@qq.com). **Danio:** Arne Casper, Bryggervangen 70 4 tv, DK-2100 København, Denmark; [arnecasper@dbmail.dk](mailto:arnecasper@dbmail.dk). **Estonio:** Ahto Siimson, Kastani 12-11, Paikuse, EE-86602 Pärnu maakond, Estonia; [ahto.siimson@esperanto.ee](mailto:ahto.siimson@esperanto.ee). **Finnlando:** Hämäläinen Sylvia, F.E.Sillanpään katu 2 C 46, FI-33230 Tampere, Finland; [sylvia.h@kolumbus.fi](mailto:sylvia.h@kolumbus.fi). **Francio:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4bis, rue de la Ceresaie, FR-75004 Paris, France; [zav@esperanto-panorama.net](mailto:zav@esperanto-panorama.net). **Germanio:** Esperanto-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, DE-55129 Mainz, Germany; [wolfgang.schwanner@esperanto.de](mailto:wolfgang.schwanner@esperanto.de). **Germanio:** Zsófia Kóródy, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, Germany; [zsafia.korody@esperanto.de](mailto:zsafia.korody@esperanto.de). **Hispanio:** Pedro Garrote, Apartado 119 Esperanto, ES-47080 Valladolid, Spain. **Hispanio:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell, Spain. **Hungario:** HEA, Thokoly ut. 58-60, II/209, HU-1146 Budapest; [hungario@gmail.com](mailto:hungario@gmail.com), [www.esperantohea.hu](http://www.esperantohea.hu). HEA vendas surloke unuopajn numerojn por la kuranta jaro po 500 ft., duono de la kutima abonprezo. Plia peranto: Boris Arrate Veranes, Emma u. 3a, HU-2030 Érd, Hungary; [simio\\_2004@yahoo.es](mailto:simio_2004@yahoo.es). **Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Skolavorðustigur 6B, IS-101 Reykjavík, Iceland; [esperanto@isl.is](mailto:esperanto@isl.is). **Israelo:** Gian Piero Savio, Rehov Menora 13/4, IL-53490 Givatajim, Israel; [saviogp@zahav.net.il](mailto:saviogp@zahav.net.il). **Italio:** Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43122 Parma, Italy; [silkovojo@aliceposta.it](mailto:silkovojo@aliceposta.it). **Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Japana filio de ILE, JP-162-0042 Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3, Japan; [esperanto@jei.or.jp](mailto:esperanto@jei.or.jp). **Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Croatia; [marija@hes-keu.hr](mailto:marija@hes-keu.hr). **Kubo:** Kuba Esperanto-Asocio, Apartado Postal 5120, CU-10500 La Habana 2, Cuba. **Litovio:** Litovia Esperanto-Asocio, ab/k 167, LT-3000 Kaunas, Lithuania; [irenaa@takas.lt](mailto:irenaa@takas.lt). **Norvegio:** Anne Karin Bondhus, Morenefare 8 A, NO-4340 Bryne, Norge; [akbondhus@jkn.no](mailto:akbondhus@jkn.no). **Nov-Zelando:** David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland 0753, New Zealand; [gddewar@ihug.co.nz](mailto:gddewar@ihug.co.nz). **Pakistano:** Jawaid Eahsan, P.O. Box 26, PK-60000 Multan, Pakistan. **Pollando:** Magdalena Tatara, Koźmicie Wielkie 323, PL-32-020 Wieliczka, Poland; [mtatara@gmail.com](mailto:mtatara@gmail.com). **Portugalio:** Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6. R/C A, PT-1500 Lisboa, Portugal; [asocio@esperanto.pt](mailto:asocio@esperanto.pt). **Rumanio:** Crancau, Ioan, B-dul Bucuresti 5/53, RO-4800 Baia Mare, Romania. **Rusio:** Halina Gorecka, ab. ja. 1205, RU-236039 Kaliningrad, Russian Federation; [sezonoj@mail.ru](mailto:sezonoj@mail.ru). **Serbio:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, RS-18000 Niš; [zciric2@gmail.com](mailto:zciric2@gmail.com). **Slovakio:** Peter Baláž, Vítazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakia; [petro@ikso.net](mailto:petro@ikso.net). **Slovenio:** Višnja Branković, Via Parini 5 IT-34 129 Trieste, Italy. **Sud-Afriko:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill 3, Bower Road, ZA-7800 Wynberg, South Africa. **Svedio:** Leif Holmlund, Kågevägen 40 B lgh 1303, SE-931 38 Skellefteå, Sweden; [leif.holmlund@telia.com](mailto:leif.holmlund@telia.com). **Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH-4224 Nenzlingen, Switzerland; [ch\\_scheidegger@bluewin.ch](mailto:ch_scheidegger@bluewin.ch). **Tajvano:** Reza Kheirhah, No. 105, Chung Ching Road, Pingtung, 900-73 Taiwan; [rezamenhof@yahoo.com](mailto:rezamenhof@yahoo.com). **Togo:** Koffi Gbeglo, B. P. 13169, Lome, Togo; [esp.togo@cafe.tg](mailto:esp.togo@cafe.tg). **Usono:** Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530, United States; [eusa@esperanto-usa.org](mailto:eusa@esperanto-usa.org). **Venezuelo:** Peter Jaimez, Poŝtkesto 3482, VE-1010 A Caracas, Venezuela. **TUTA MONDO:** Abonservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Netherlands; [uea@uea.org](mailto:uea@uea.org). **Mendojn eblas sendi ankaŭ al** [ILEI.officejo@gmail.com](mailto:ILEI.officejo@gmail.com).





